

EL POPOLA ĈINIO

中國報通

4

8

1978



Bona Funkciigo de agronomia eksperimentado

Fotoj de GANG LIANMEJ



Intermiksa kulturado de tritikaj kaj kotonaj plantoj

En 1958 nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ inspektis Kilijing-popolkomunumon kaj tie li faris al la tuta lando grandan alvokon "Bona estas popola komunumo". Multe instigate la komunumanoj energie disvolvis agronomian eksperimentadon kaj per tio akiris stabilan altan rikolton de greno kaj kotono en sinsekvaj jaroj. La meznombra hektara produktokvanto de pli ol 3,700 hektaroj da grenkampoj de la komunumo atingis 10,500 kg en 1976, kaj tiu de ĝiaj pli ol 2,060 hektaroj da kotonaj kampoj estis pli ol 750 kg. en 11 sinsekvaj jaroj.

Observante la instrukcion de Prezidanto Maŭ "Nepre faru kaj gajnu la batalon sciencan kaj teknikan", la nomita komunumo vaste faris sciencan eksperimenton laŭ lokaj kondiĉoj kaj akiris rimarkindan sukceson en kulturado de novaj bonaj specioj kaj esploro pri tekniko de protektado kaj kulturado de plantoj. Sciencaj grupoj surkampe faris enketon, kaj elkulturis novan kotonspecion kontraŭ tigovelkiĝo kaj verticila velkiĝo per hibridigo de enkondukitaj kontraŭmalsanaj specioj de kotono. Dank' al tio la komunumo akiris riĉan rikolton de kotono en sinsekvaj jaroj. En 1973, ili elkulturis novan specion de tritiko kontraŭmalsanan, frue maturiĝan kaj altproduktan. Nun oni disvastigas tiun specion en la tuta komunumo.

世界语月刊

中国报道

一九七八年第八期目录

他们在建设人间乐园	龙 林 (2)
渔村妇女	洪虎石 (8)
【读者与编者】关于中国的人民公社 (答《中国报道》新读者问)	(11)
齐奥塞斯库总统访问中国	段 吉 (15)
沸腾的钢城	晓 东 (20)
访胸外科专家辛育龄	毕靖、黄威 (25)
一对青年的婚礼	石冬青 (29)
旧友重逢	靚 道 (31)
我为什么学习世界语	邱 及 (33)
《青春之歌》(长篇小说连载之七)	杨 沫 (35)
【北京一角】天坛	罗哲文 (40)
【友谊】中国人民的忠实朋友埃德加·斯诺 (待续)	江 山 (45)
中国将参加国际木偶节演出	(50)
【文物与考古】东陵	(51)
【集锦】“毛孩”、金钱与正义、谜语	(56)
【世界语消息】	(56)
【简讯】六条	(28、30、50)

封 面：友谊

封 底：高山花草

彩色画页：1 办好农业科学实验 (张谦美摄影)

2 海滨城市——连云港 (中心画页)

3 特种纪念邮票《奔马》

4 彩塑

黑白画页：5 连环画《八哥》(续)

1 三届亚洲羽毛球邀请赛

2 北京国际排球友好邀请赛

3 龙井茶产地——杭州



Eksperimenta kam-
po inspektita de
Prezidanto Maŭ en
1958

Mezurado de tera
temperaturo en
tritika eksperi-
menta kampo



Faka specialisto kaj
komunumano kon-
trollas velkadon de
tritikaj plantoj.



13

Scienca grupo faras
seksan hibridigon de
tritikaj plantoj.





Scienc kulturado donis riĉan rikolton de tritiko en sep sinsekvaj jaroj.



La laboratorio de la Agronomia Stacio faras analizon pri grundoj kaj la nutreco de plantoj.

Ekspertizado pri la kvalito kaj produkta kvanto al novaj specioj sur eksperimentaj kotonkampoj




Observado pri kreskado de tritiko post atoma radiado




Tentado kaj ekstermado de kotonafidoj per flavaj tabuloj

Esplorado pri generado de kotonfrukta insekto (*Heliothis armigera*)






Kotono vendita al la štato





LA TRIA AZIA INVITA VOLANA KONKURSO



Ĉampiono de la duopa kna-
bina konkurso — singaporaj
sportistinoj Tay Hoe See kaj
Lee Joo Peng

Ĉampiono de la duopa virina
konkurso — tajlandaj spor-
tistinoj Thongkam kaj Patama






Ĉampiono de la duopa
vira konkurso — ĉinaj
sportistoj Tang Hianhu
(dekstre) kaj Lin
Ŝikjuan

Ĉampiono de la unuopa
knaba konkurso — ĉina
sportisto He Sangkjuan



Hindiaj sportistoj de la duopa vira konkurso P. Prakash (dekstre) kaj
S. Modi, kiuj gajnis rajton partopreni en la finalo, en la semi-finalo





Interŝanĝo de volana ludarto




Ekskurso al la Granda Muro



INTERNACIA VOLEJBALA AMIKA INVITA TURNIRO DE PEKINO EN 1978

En la lasta virina konkurso, la ĉina teamo gajnis la ĉampionecon venkinte la japanan per 3 kontraŭ 0 kaj la japana teamo gajnis la subĉampionecon.



En la lasta vira konkurso, la japana teamo gajnis la ĉampionecon venkinte la ĉinan per 3 kontraŭ 2 kaj la ĉina teamo gajnis la subĉampionecon.



Antaŭ konkurso, teamanoj de Ĉinio kaj Brazilo donacas memoraĵojn unuj al aliaj.



Kanadaĵ teamanoj kuraĝaj kaj obstinaj en bona kunagado

EL POPOLA ĈINIO

中國報通

1978
N-or 8
(239)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Enhavo

KOVRILO:

P. 1. Amikeco

P. 4. Altmontaj plantoj

KOREKTO POR N-RO 7

P. 23, maldekstra kolono, 7-a linio de malsupre: "produkto" estu legata **produ**to.

P. 34, dekstra kolono, 14-a linio: "reflekseblaj" estu legata **ne**reflekseblaj.



Ili konstruas surteran paradizon	2
Virinoj de fiŝista vilaĝo	8
INTER NI: Pri la popolaj komunumoj en la ĉina kamparo	11
Vizito de Prezidanto Ceausescu al Ĉinio	15
Bolanta urbo de fero kaj ŝtalo	20
Toraka kirurgo Hin Juling	25
KURANTAJ AFEROJ	28, 30, 50
Geedziĝo de juna paro	29
Renkontiĝo de malnovaj amikoj	31
Pro kio mi lernis Esperanton?	33
Kanto de la juneco (romano)	35
EN PEKINO: La ĉiela altaro	40
AMIKECO: Edgar Snow — fidela amiko de la ĉina popolo	45
Ĉinio partoprenos en la Internacia Pupteatra Festivalo de Zagrebo	50
HISTORIAJ OBJEKTOJ: La Orientaj Maŭzoleoj	51
ESP-NOVAĴOJ	56
KALEJDOSKOPO: 1. Haroza infano	56
2. Mono kaj justeco	56
3. Enigmo pri objekto	56

Ili Konstruas Surteran Paradizon



EN marto de la kuranta jaro, kiam pompis floroj kaj viglis papilioj kaj abeloj, mi vizitis la kamparon de Taŭjuan-gubernio de Hunan-provinco kaj estis multe kortuŝita de ĉio vidita kaj aŭdita tie. Dum la vizitado mi informiĝis, ke la popolkomunumoj, post sia fondiĝo en 1958, ludas grandan rolon en reformado de la naturo, disvolvo de produktado, altigo de la popola viv-nivelo, ktp.

Bela Legendo


Forlasinte la provincan ĉefurbon Ĉangŝa, mi veturis okcidenten 210 kilometrojn kaj atingis la gubernian urbon Taŭjuan. En Ĉinio, je mencio de "Taŭjuan" (ĉine signifas riveran fonton kun persikaj arboj), oni nature ekmemoris la artikolon "Pri Rivera Fonto kun Persikarbaj Floroj", verkita de la fame konata antikva poeto Taŭ Kian. Laŭdire, la nomita "Rivera Fonto kun Persikarbaj Floroj" troviĝis ĉe la bordo de Juan-rivero je 15 kilometroj sude de la guberniurbo. En la artikolo la poeto rakontis belan legendon.

Iutage fiŝisto fiŝadas sur rivereto. Subite vidiĝas antaŭ li floranta persikarbaro. Ĉie sternaĝas floroj kaj aromaodoro atakas la flarsenton. Tio tre mirigas la fiŝiston. Li daŭre veturas antaŭen kaj venas al la fonto de la rivereto, trapasinte la persikarbaron. Akvo murmure elfluas el mon-

ta kaverno. Alproksimiĝinte al ĝi, li trovas, ke en la kaverno ŝajne estas malforta lumo. Li do forlasis la boaton kaj eniris la kavernon. Irinte dekojn da paŝoj prezentiĝas antaŭ li granda vilaĝo kun bonordaj domoj, ĉirkaŭata de fekundaj kampoj, morusarboj kaj bambuoj. Ĉio belas mirinde. Tie, la viroj plugas kaj la virinoj teksas. Ili ĉiuj, ĉu maljunuloj aŭ infanoj, vivas feliĉe kaj libere. La alveno de la fiŝisto mirigas la vilaĝanojn. Oni varme invitas lin al sia domo kaj regala lin per vino kaj kokaĵoj. Post kiam la fiŝisto revenis hejmen, li rakontis ĉion, kion li travivis tie. Tio interesis multajn homojn. Poste, aliaj homoj, sekvante la fiŝiston, iris serĉi la edenon, sed malsukcesis. Tio estis la surtera paradizo aspirata de la homoj dum miloj da jaroj.

Fakte, en la malnova Ĉinio ne estis tia surtera paradizo. En la vizitado, iuj komunumanoj rakontis al mi jenajn travivaĵojn:

Taŭjuan-gubernio situas en monteta regiono kun multaj riveretoj. En la pasinteco la loko ofte suferis katastrofojn de inundo kaj sekeco. Ekzemple, en 1943 okazis granda superakvo. Multaj kadavroj flosis laŭ la fluo de Juan-rivero. Profitante la kazon de katastrofo, bienuloj kaj tiranoj devigis farmistojn pagi terrenton kaj ŝuldojn, kaj la registaro de Kuomintang rekrutis




Junaj arbaroj de Ĝifangŝan

junulojn kaj kolektis grenimposton. La kamparanoj multe suferis mizeron. La popolo de Taŭjuan brave batalis kontraŭ la subpremado de la regantaj klasoj. En la dudekaj jaroj de la kuranta jarcento, pli ol centmil kamparanoj de la gubernio aliĝis al la kamparanaj ligoj kaj partoprenis en la kamparana movado persone gvidata de Prezidanto Maŭ. Tenante glavojn kaj lancojn ili batalis kontraŭ bienuloj, tiranoj kaj

koruptiĝintaj oficistoj. En la fino de 1949 tiu loko liberiĝis. Tio malfermis al la laboranta popolo larĝan vojon por efektivi la idealon.

Forto de Popolaj Komunumoj

Por sin liberigi el malriĉeco kaj postiĝinteco, la popolo de Taŭjuan komencis konstrui sian hejmlokon. Ili aktive partoprenis en la Agrara Reformo sub gvido de la Partio. Post la abolo



*Kluzo sur
Bajjang-rivero*


de la feŭda posedsistemo de tero, ili fondis agrikulturajn kooperativojn. Dank' al kio disvolviĝis la produktado kaj pliboniĝis la popola vivo. Tamen, la kooperativoj, pro siaj negrandaj fortoj, povis fari nur iujn malgrandajn akvoutiligajn kaj kampajn konstruojn.

En aŭtuno de 1958, por grandskale fari konstruadon kampan kaj akvoutiligan, ili fondis popolkomunumojn. Nur en du vintroj kaj du printempoj, ili konstruis unu grandan akvokonservejon kaj pli ol cent mezajn kaj malgrandajn akvokonservejojn, kun totala kapacito de pli ol 500,000,000 kubmetroj. Tio manifestis potencon de la popolkomunumo. En la postaj dek jaroj, la komunumanoj daŭre kompletigis la konstruaĵojn. Dank' al tio la areo de la irigaciataj kampoj de la gubernio plimultiĝis je 9-oblo ol tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo, tiel ke la gubernio kun nesufiĉa greno en la historio havis superfluan grenon.


En la sepdekaj jaroj, la kolektiva ekonomio de la popolaj komunumoj havis plian disvolviĝon, la popolo de la gubernio en la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo, faris plenampleksan planon por sinteza ordigo de montoj, akvoj,

arbaroj, kampoj kaj vojoj. Por tio la gubernio ĉiujare devis disponi 200,000 laborulojn kaj milionojn da juanoj. Nun, ĝi havas 62,000 hektarojn da kampoj kontraŭ sekeco kaj inundo, kiuj okupas preskaŭ 70% de ĝia totala agraro. La meznombro hektara produktokvanto de greno jam superis 6,000 kilogramojn. Ĝi ĉiujare liveras al la ŝtato grandajn kvantojn da greno, kotono, oleaj materialoj kaj porkoj. Mi propraokule vidis la fruktojn de ilia konstruado en la baseno de Bajjang-rivero.

La rivero longas 121 kilometrojn, ĝia baseno estas la ĉefa produktejo de greno kaj kotono de Taŭjuan-gubernio kaj havas pli ol 28,000 hektarojn da agraro. Antaŭ la Liberiĝo, ambaŭborde de la rivero estis multaj sablozaj dezertejoj. En pluva sezono la rivero inundis kampojn. Tamen, en seka sezono la riverakvo estis ne utiligebla pro manko de pumpiloj. Post kiam oni konstruis Huangŝi-akvokonservejon ĉe la supra baseno de la rivero en 1959, la minaco de inundo kaj sekegeco estis moderigita. En la lastaj jaroj, por plene utiligi la akvofonton 23 komunumoj en la baseno kune ordigis Bajjang-riveron. En la supra baseno, komunumanoj konstruis multajn



Hiaŭhekoŭ-brigado



Stuparaj kampoj de Huanggiabo-komunumo de Taŭjuangubernio

akvokonservejojn kaj riverdigojn. Ĉirkaŭ iuj akvokonservejoj fondiĝis fiŝbredejoj, hortikulturejoj, forstumejoj kaj brutobredejoj. La ĉefa fluo de Bajjang-rivero estas dividita de 5 grandaj digo en 6 partojn, kaj oni konstruis ĉe la digoj akvoradaj pumpstacioj, kiuj povas kaj levi akvon kaj produkti elektron. La elektro ne nur solvis la problemon de lumigo en la kamparo, sed ankaŭ ebligis funkciigi multajn pumpstaciojn por irigacii dekmilojn da hektaroj da kampoj ambaŭborde de la rivero.

* En vintro de 1973, centmil kamparanoj el 38 komunumoj de la gubernio finkonstruis la ĉefan konstruaĵon ĉe la elirejo de Bajjang-rivero en tri monatoj. Oni fosis kanalon longan je 5 kilome-

troj, larĝan je 195 metroj kaj profundan je 12 metroj; konstruis grandan digon kun longeco de 15 kilometroj; kaj fosis akvodrenan kanalon longan je 9 kilometroj. Dank' al tio riĉa rikolto estas garantiata. Guanggiakiaŭ-brigado estas en malalta tereno, tial ĝi ĉiam suferis de inundo, akvostagno kaj sekeco en la historio. Post finiĝo de la ĉefa konstruaĵo, ili fosis drenan kanalon, konstruis elektran pumpstacion kaj subterajn kanalojn. Dank' al ĉio ĉi tio la irigacia sistemo pliboniĝis kaj la kampoj estis ĝardene aranĝitaj. La hektara produktokvanto de greno nun kreskis de pli ol 2,000 kilogramoj en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis 14,040 kilogramoj.

Krome, la komunumanoj plantis arbidojn sur kalvaj montoj kaj konstruis ŝtupajn kampojn por teni akvon kaj teron. Veturante per aŭto en montoj, ni vidis, ke ĉie kreskas cedroj, pinoj, cipresoj kaj ole-kamelioj. Kiom da energio la komunumanoj pagis por verdigi la montojn!

Ĝifang-montaro situas en la orienta parto de la gubernio. Ĝiaj 160 grandaj kaj malgrandaj montpintoj sin trovas en la komunumoj Jutian kaj Zoŭgiaŭ. Antaŭe, sur la montoj ĉie amasiĝis ŝtonoj kaj kreskis herboj. Pluvakvo faris sur ili sennombrajn sulkojn. Kiam pluvegis, teraĵo ruliĝis de sur la monto en kampojn kaj ŝtopis kanalojn. En vintro de 1970, membroj de la du komunumoj venis al la montoj, forportis ŝtonojn kaj plantis te-arbidojn. Tamen, en la sekvinta jaro plejparto de la plantidoj mortis de sekeco. Sed, la komunumanoj estis ne timigitaj kaj sukcese plantis pinojn kaj cedrojn sekec-rezistajn. Nun, la areo de pli ol 700 hektaroj de la montoj jam estas verdigita per pinoj, cedroj, oranĝarboj kaj tearboj.

La sukcesa kulturado de arbaroj sur Ĝifang-montaro donis bonan ekzemplon al la aliaj komunumoj de la gubernio. De tiam, en ĉiu vintro kaj printempo dekmiloj da komunumanoj surmonte plantas arbidojn. Plejparto de la komunumoj kaj produktaj brigadoj fondis tie forstumojn kaj arbidkulturejon. Dank' al zorgema flegado, pli ol 95% de la plantitaj arboj bone kreskis. En la periodo de 1971 ĝis nun, la tuta gubernio forstumis teron de 50,667 hektaroj. Tre mirinde estas, ke utiligante sian superecon kelkaj aŭ dekelkaj komunumoj kune plantis arbidojn sur kelkaj eĉ dekelkaj montpintoj en nur unu vintro kaj unu printempo. Nun, la gubernio havas 5 arbokulturajn bazlokojn, kiuj okupas po pli ol 7,000 hektarojn.

La verdigo de kalvaj montoj efike tenas akvon kaj teron, protektas la akvoutiligajn instalaĵojn, plibonigas la akvodrenan kaj irigacian sistemon kaj antaŭenpuŝas la agrikulturan produktadon. En la gubernio ĉie vidiĝas bone kreskantaj grenplantoj kaj arbaroj. Komunumanoj priskribas la hodiaŭan Taŭjuan per jenaj versoj:

*La akvo fluas laŭ la homa vol',
Olee regas ĉie verd-kolor'.*


*Aspektas pitoreske l' mont-vilaĝ'.
Ĉiu-okaze certos riĉ-rikolt'.*

Nova Vilaĝo

La popolo de Taŭjuan klopodas ankaŭ por plibonigi la kondiĉojn de kulturo, higieno kaj loĝado. Antaŭ la Liberiĝo, tiu loko estis malriĉa kaj izola. Plejparto de la kamparanoj estis analfabetoj de generacio al generacio kaj ofte turmentitaj de morbilo, variolo, malario kaj aliaj epidemioj, pro manko de monrimedoj por konsiliĝi al kuracistoj kaj aĉeti medikamentojn. Plejparto de ili loĝis en malaltaj kaj humidaj kabanoj. Nur post la Liberiĝo la popola vivo pliboniĝis paŝon post paŝo.

Post fondiĝo de popolkomunumoj, kun la disvolviĝo de produktado la publika akumulita fonduso pli kaj pli multiĝis. Ĉiu komunumo elspezis parton el sia bonstatiga fonduso por fondi kulturajn kaj higienajn instalaĵojn, tiel ke la geknaboj povas viziti lernejojn kaj oni plibonigis la kondiĉojn de higieno kaj kuracado. En la lastaj jaroj, multaj produktaj brigadoj elspezis certan monsumon por konstrui novajn domojn. Ekzemple, Hiaŭhekoŭ-brigado vizitita de mi havas 7 taĉmentojn kaj 881 loĝantojn. La partia sekretario de la brigado Ju Pijuan diris al mi: Kvankam post kooperativigo oni konstruis nombron da lignostrukturaj tegolaj domoj, tamen ili lokiĝis tre dise, kio ne oportunis al la produktado kaj la vivo. En 1976, oni komencis laŭplane konstrui novajn loĝpunktojn. Nun la komunumanoj de unu taĉmento transloĝiĝis en novan vilaĝon. Mi faris viziton al ĝi en akompano de la sekretario.

*Angulo de la
forstoregiono de
Vantoŭŝan*



Antaŭ la vilaĝo estas ŝoseo kaj kampoj kaj dorse de ĝi staras monto. Ĉe la enirejo de la vilaĝo estas tri duetaĝaj domoj. Unu el ili estas kooperativa kuraca stacio kun la sekcioj de diagnozo, kemi-analizo, operacio, X-radia ekzameno, apoteko de ĉinaj drogoj kaj kelkaj ĉambroj por malsanuloj. Tie la komunumanoj povas ricevi ĝustatempan senpagan kuracadon. La dua domo servas kiel la oficejo de brigado kaj la lernoĉambro de komunumanoj. La lasta estas vendejo. En la vendejo, malproksima de la gubernia urbo, estas diversspecaj varoj. En la vilaĝo troviĝas barbarejo, kudrogrupo kaj infanĝardeno funkciigataj de la brigado, kiuj senpage servas al la komunumanoj. La brigado havas lernejon, kiu donas lecionojn de elementa lernejo kaj malsupera mezlernejo. La brigado jam komencis ĝeneraligon de edukado de malsupera mezlernejo. La brigado havas sian agronomian stacion, kie gejunuloj povas fari agrikulturan sciencon eksperimentadon. Krome, en la vilaĝo estas publika manĝejo.

La brigado fondis ankaŭ elektrejon de 96 kilovatoj kaj senpage liveras elektron al la komunumanoj. Dank' al uzo de elektro, starigis prilabora fabriko de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. Nun efektiviĝis meĥanizo en prilaborado de greno, kotono, olea materialo ktp.

Baldaŭ finiĝos konstruado de la nova teatro, biblioteko kaj banejo, kie oni ĝuos ankaŭ senpagan servon.

Veninte al la tria taĉmento, mi vidis vicon post vico da belaj domoj solide masonitaj el bluaj ŝtonoj. Oni diris, ke la domoj estis disdonitaj senpage laŭ reala bezono de ĉiu familio; ĉiu

homo povas okupi meznombro areon de 20 kvadrataj metroj. La konstrua kosto de la domoj estas ne multa, ĉar la ŝtonoj kaj lignoj bezonataj en konstruado estis akiritaj de komunumanoj mem ĉeloke kaj la projektado kaj konstruado tute estis plenumitaj de ili. Ili konstruis akvo-konservejon post la monto kaj nun instalas akvotubon de tie al la vilaĝo.

Mi estis varme akceptata de komunumano Ĝang Ŝaŭkju en lia domo. La 60-jara mastro tre sana ofte partoprenas en fizika laboro. Li kaj lia maljuna edzino havas 4 filojn kaj unu filinon, unu bofilinon kaj unu nepon. La tria kaj kvara filoj vizitas lernejon kaj la aliaj laboras. La abiturienta bofilino estas filmprojekciistino de la brigado kaj instruistino de la infanĝardeno. La ĉambroj estas meblitaj bone kaj modeste. Lia dua filo edziĝis apenaŭ du jarojn kaj ĉiuj mebloj en la dormoĉambro estas novaj. La mastro emocie diris: "Se ne estus la popolkomunumo, ni neniel povus loĝi en tia bona domo!" Li diris prave. Antaŭ la Liberiĝo, ĉiuj kampoj kaj arbaroj de la vilaĝo apartenis al unu bienulo. En la aĝo de 9-16 jaroj Ĝang Ŝaŭkju paŝtis bovojn por la bienulo. Poste, li farmis liajn kampojn kaj ĉiujare devis pagi al la bienulo tri kvaronojn de la rikoltita greno. Tiam, lia familio havis 7 membrojn, loĝis en unu kabano kun tri ĉambretoj kaj vivis mizere.

Aŭskultinte la rakonton de la mastro kaj rigardante la nunan feliĉan vivon, mi nature pensis, ke la "surtera paradizo" aspirata de poeto Taŭ Kian antaŭ pli ol 1,600 jaroj estas konstruata en nia lando paŝon post paŝo.


(Verkita de **LONG LIN**)

Flegistoj ŝprucas insekticidon al junaj arboj.



HONG HUŜI:


Virinoj de fiŝista vilaĝo



UNU el la grandaj ŝanĝoj en la ĉina kamparo post la starigo de la popolaj komunumoj estas la liberigo de la vastaj amasoj de virinoj. Antaŭ nelonge, mi faris mallongan viziton al Dajudaŭ-brigado de Ŝidaŭ-komunumo sur la bordo de la Flava Maro. Profunde min impresis la rolo ludita de ĝiaj virinoj en la socia vivo kaj ilia kontribuo al la disvolvado de fiŝkaptado.

LA FABRIKO DE ŜNUROJ KAJ RETOJ

Dajudaŭ-brigado ĉefe okupiĝas pri fiŝkaptado. Tiu vilaĝo havas pli ol 1,300 familiojn kun pli ol 2,300 laborkapabluloj, inter kiuj estas 1,000 virinoj. Iutage, mi vizitis la Fabrikon de Ŝnuroj kaj Retoj en la mezo de la vilaĝo. Tiu fabriko en trietaĝa domo estas funkciigata de la brigado por produkti diversajn ŝnurojn kaj retojn



Post laboro



La fiŝista vilaĝo

bezonatajn de la brigado, kaj ĉiuj ĝiaj laborantoj estas virinoj. La estrino de la virina asocio de la brigado Gu Ĝaŭfeng sciigis al mi, ke en la pasinta jaro, la virinoj pliapaŝe liberiĝis de pensaj katenoj kaj fariĝis pli entuziasmaj dank' al malkaŝado kaj kritikado de la "kvarpersona bando" de Vang, Ĝang, Giang kaj Jaŭ, kaj en 7 monatoj la fabriko jam produktis pli ol 300,000 kilogramojn da ŝnuroj por fiŝkaptado kaj 1,500 retojn, kaj per tio ne nur plenumis la bezonon de la produkta brigado, sed ankaŭ helpis aliajn fiŝkaptajn brigadojn en urĝa bezono.

Kiam mi demandis Gu Ĝaŭfeng, kiel oni ebligis al tiel multaj virinoj partopreni en produktado, ŝi diris al mi fiere: "Estas la popola komunumo, kiu pliapaŝe liberigis la virinojn." Kaj poste, ŝi detale rakontis al mi pri la fondiĝo kaj disvolviĝo de la Fabriko de Ŝnuroj kaj Retoj.

Antaŭ la Liberiĝo, la tiaj virinoj, same kiel la virinoj de la aliaj lokoj de la tuta lando, estis katenitaj de feŭdaj kaj superstiĉaj pensoj. Ekzemple, oni malpermesis la virinojn partopreni en fiŝkaptado, ĉar "la retoj faritaj de virinoj eŝtas misfortunaj" kaj "la ŝipoj kiujn ascendis virinoj, renversiĝas sur maro". Tial, la virinoj povis okupiĝi nur pri dommastrumado kaj vivi depende de la edzo. Post la Liberiĝo, la ŝtato alprenis serion da paŝoj por altigi la socian

pozicion de la virinoj, kaj ilia politika konscio estis altigita tra partopreno de sociaj aktivadoj kaj lernado pri politikaj aferoj. Post la fondo de la fiŝkaptaj kooperativoj, la viroj devis tage fiŝkapti surmare kaj nokte faradi ŝnurojn kaj retojn, kaj precipe post efektivigo de meĥanizo de fiŝkaptado la viroj devis fiŝkapti en malproksima maro, sekve la produktado de ŝnuroj kaj retoj fariĝis malfacile plenumbla pro foresto de plejparto de la viroj. En tia situacio, nemalmultaj virinoj firme decidis rompi la superstiĉon kaj postulis, ke oni permesu al ili preni al si la taskon de produktado de ŝnuroj kaj retoj. Subtenate de la partia filio, fondiĝis en Dajudaŭ la Fabriko de Ŝnuroj kaj Retoj kun dekelkaj virinoj-laborantoj, en la jaro 1957.

Post la fondiĝo de la popola komunumo en 1958, la partia filio decidis liberigi ankoraŭ pli multe da virinoj el dommastrumado kaj partoprenigi ilin al fiŝkaptado, por ke la fiŝkaptado ne posteigu en la impetado de la tuta lando. La brigado fondis manĝejon, mamnutrejon, infanĝardenon, infanvartejon, kudrejon kaj tiel plu kun virinoj kiel plejparto de iliaj funkciuloj, kaj eĉ boligita akvo bezonata de la komunumanoj estis liverita de komuna servo. Dank' al tio la virinoj liberiĝis de dommastrumaj laboroj kaj unuj post aliaj iris en la socion. Tiujare, la nombro de la virinoj en la Fabriko de Ŝnuroj

kaj Retoj kreskis ĝis ĉ. 300. Kaj krome, la brigado praktikas la politikon "sama rekompenco por sama laboro de viro kaj virino", kio pli altigis la aktivecon de la virinoj en laborado.

Nun la virinoj de la brigado okupiĝas ne nur pri farado de ŝnuroj kaj retoj, sed ankaŭ pri ŝipfarado, surtera transportado, barbirado, kuracado, radiodisaŭdigo, projekciado de filmoj kaj aliaj entute pli ol 20 specoj da laboroj.

NOVA FORTO EN SURMARA PRODUKTADO

Por kontentigi la kreskantan bezonon de la popola vivo al maraj produktaĵoj, la virinoj de Dajudaŭ malfermis kultivejon de laminarioj en la maro je 25 kilometroj fore de la vilaĝo.

Kiam mi venis al tiu loko, ĝuste estis tempo por flegado de laminariaj plantoj. Montrante dikajn laminariojn kreskantajn sur ŝnuro, Bi Kejoŭ, estro de la brigado, diris al mi, ke la virinoj pene laboris dum multaj jaroj en tiu loko por kultivi laminariojn.

En 1966, kiam oni komencis la kultivadon, okazis atako de frosto nespertita dum dekoj da jaroj kaj neĝtavolo profunda ĝis genuo kovris la marbordon. Bi Kejoŭ venis tien kun pli ol 300 virinoj sub sia gvido. En pajlaj budoj, ili surŝnurigis laminariajn plantidojn, trempante la manojn en frosta akvo. Iliaj manoj sensentiĝis pro malvarmego, sed iom varmiginte ilin per kunfrotado, ili daŭrigis la laboron. Kaj tiamaniere, post 47-taga penlaborado, ili plenumis la taskon de surŝnurigado de plantidoj por 1,000 muoj da laminaria kultivejo (15 muoj = 1 hektaro).

Varmega julio estas tempo por rikolti laminaron. Transportante kaj prilaborante laminariojn, la virinoj devas iri 50 kilometrojn en unu tago. Sed ili ne plendis pro la penigo. Iun posttagmezon, pli ol 20,000 kilogramoj da duone sekigitaj laminarioj estis sunumataj sur la sabla bordo, kiam subite pluvegis kaj blovis furioza vento. Minacis danĝero, ke la ventego forportos la laminariojn en la maron. Song Juĝen kaj aliaj 6 virinoj ripozantaj tuj amasigis la laminariojn kaj ilin kovris per matoj. Sed ĉiam pli

furioziĝis la uragano; por protekti la amason da laminarioj, ili sin ĵetis sur ĝin kaj tiamaniere savis la rikoltaĵojn de la kolektivo.

VIRINA FIŝKAPTA ŜIPO

En Dajudaŭ cirkulas ankaŭ rakonto pri la virina fiŝkaptista ŝipo "La Oka de Marto". Ĉiuj membroj de tiu fiŝkaptista grupo senescepte estas junaj virinoj. En la lastaj 7 jaroj, ili fiŝkaptadis sur maro je 500 kilometroj fore de la vilaĝo kaj ĉiujare superplenumis la produktan taskon.

En la komenco, ĉiuj ŝipanoj suferis marmalsonon, tamen ili venkis la malfacilojn per obstina persistemo kaj alkutimiĝis al surmara vivo. Pli poste, ili ellernis difinon de direkto de vento kaj marfluo, memoris la situon de maraj kaj fiŝkaptaj areoj kaj akiris la teknikojn de detektado de fiŝaroj kaj metado de reto.

En nokto de la 19-a de januaro, 1974, kiam ili estis fiŝkaptantaj sur maro, la 19-jara Fu Ŝili estis puŝita de ondo en la maron dum metado de reto. Ŝi estis jen glutita de ondeggo, jen puŝita sur ondopinton. Finfine ŝi revenis sur la ŝipon sub helpo de aliaj. La ŝipestrino proponis veturi hejmen por ke ŝi ripozu surborde, sed malgranda Fu diris: "Ja ne gravas, ke mi min banis en la frosta akvo; mi min sentas tute bonfarta, do ni daŭrigu la fiŝkaptadon."

Antaŭ nelonge, la unua ŝipestrino de la ŝipo "La Oka de Marto" Song Lifen estis promociita kiel vicestrino de la Buroo de Akvaj Produktaĵoj de Jongĉeng-gubernio, kaj Fu Ŝili transprenis ŝian oficon de ŝipestrino. Nun malgranda Fu estas batalanta tra ventoj kaj ondoj sur la vasta maro, kune kun siaj 37 kamaradinoj en la ŝipo de 200-ĉevalpovoj.

Dank' al tio, ke la virinoj plene ludis sian rolon en produktado, pasintjare tiu brigado kaptis pli ol 12,000 tunojn da fiŝoj, rikoltis pli ol 2,000 tunojn da laminario kaj liveris al la ŝtato 7-oble tiom da maraj produktaĵoj kiom en 1956 antaŭ la fondo de la Fabriko de Ŝnuroj kaj Retoj. Krom tio, la virinoj ankaŭ fariĝis sendependaj en ekonomio kaj akiris egalrajtecon en politiko rilate al la viroj. Nun 20 procentoj de la kadroj de tiu brigado estas virinoj.

Pri la popolaj komunumoj en la ĉina kamparo

— Respondo al novaj legantoj de EPC

EN la lastaj jaroj, senĉese multiĝas niaj novaj legantoj. Iuj el ili elmetis al nia redakcio demandojn pri la popolaj komunumoj en la ĉina kamparo. Ĉi-sube ni iom parolu pri koncernaj aferoj.

La popolaj komunumoj estis starigitaj ĝenerale en aŭtuno de 1958. Ili estas integra baza unuo ambaŭ de la proleta ŝtatpotenco

kaj la socialisma socio en la kamparo. Ilia funkcio egalas al tiu de la antaŭaj *hiang*-aj popolaj registaroj en administrado de produktado, financo, kulturo, eduko, higieno, civilaj aferoj, publika sekuro kaj milicio. Kaj en longa historia periodo, ili kiel socialismaj organizoj de interhelpa kaj interutiliga kolektiva ekonomio rekte organizas kaj

gvidas diversajn produktadojn kaj konstruadojn de sia komunumo. Ili estas tute novaj sociaj organizoj de laboristoj, kamparanoj, financaj, komercaj, edukaj kaj higienaj laborantoj, lernantoj kaj komunumanoj-milicianoj.

La popolaj komunumoj elvolviĝis surbaze de agrikulturaj produktaj kooperativoj. Ili havas pli multe

Spruca irigaciado de Daĝaj-brigado



da homoj, agroj, kapitalo kaj ekonomiaj fortoj ol la agrikulturaj produktaj kooperativoj, kio ebligis al ili fari fundamentan konstruadon de kampoj en relative granda skalo, fari sciencajn eksperimentojn, batali kontraŭ naturaj katastrofoj, pli multe uzi maŝinojn kaj elektrajn ekipaĵojn, pli bone entrepreni samtempe agrikulturon, forstokulturon, paŝtadon, flankokupojn kaj fiŝadon, kaj funkciigi entreprenojn de industrio, riparado kaj transportado servantajn al agrikulturo.

La posedsistemo de la popolaj komunumoj en nuna etapo ĝenerale estas tri-nivela de komunumo, produkta brigado kaj produkta taĉmento, kun la lasta kiel la baza kalkula unuo. Produkta taĉmento administras kaj disponas siajn laborfortojn

kaj produktajn rimedojn kiel ekz. ŝarĝbrutojn, agrojn, maŝinojn ktp., faras sendependan kalkulon pri enspezo kaj distribuo kaj mem respondas pri siaj propraj profitoj aŭ perdoj. Se la komunumo aŭ brigado bezonas uzi laborfortojn, agrojn, maŝinojn aŭ aliajn materialojn de produkta taĉmento aŭ aranĝas kunlaboron inter produktaj taĉmentoj, ili nepre devas akiri konsenton de la koncernaj produktaj taĉmentoj kaj rigore sekvi la principon de memvoleco kaj egalkosta interŝanĝo.

La produktaj brigadoj nun funkciigas entreprenojn, kiujn produktaj taĉmentoj ne povas funkciigi pro manko de fortoj, aŭ por kiuj brigada funkciigo estas pli avantaĝa, kiel ekz. akvorezervejo, prilaborejo de agrikulturaj produktaĵoj, maŝin-

riparejo, fruktoĝardeno, elementa lernejo kaj koopera kuracejo.

Kaj la komunumoj nun funkciigas entreprenojn, kiuj estas nun nefunkciigeblaj por produktaj brigadoj pro manko de fortoj, aŭ por kiuj komunuma funkciigo estas pli avantaĝa, kiel ekz. traktora stacio, hidroelektrejo, irigacia stacio, riparejo kaj fabriko de agrikulturaj maŝinoj, forstejo, bredejo de sembrutoj, kulturejo de bonaj semoj, agronomia eksperimentejo, mezlernejo kaj hospitalo.

Nuntempe plej granda estas la parto de la produktaj taĉmentoj en la trinivela ekonomio. Kun la disvolviĝo de la kolektiva ekonomio kaj leviĝo de socialisma konscio de la komunumanoj, la baza kalkula

Bredejo de fiŝidoj de popola komunumo



Komunumanoj de Bajĝaj-komunumo de Kjuĝoŭ-gubernio de Hebej-provinco estas ŝprucigantaj insekticidon.



unu transiros de produktaj taĉmentoj al brigadoj kaj komunumoj kaj pliapaŝe al la ŝtata posedanteco.

La distribuado kun produktaj taĉmentoj kiel baza kalkula unuo estas la ĉefa formo de distribuado de la komunumoj. Plejparto de la jara totala enspezo de la produktaj taĉmentoj estas distribuata al la komunumanoj, post subtraho de la kostoj por produktado kaj administrado en tiu jaro, tre malgranda parto kiel imposto al la ŝtato, kaj malgranda parto kiel publika akumula fonduso kaj publika bonstatiga fonduso.

La publika akumula fonduso estas uzata por aĉeti agrikulturajn instrumentojn kaj maŝinojn, fari fundamentan konstruadon kaj plivastigi reproduktadon. Kaj la pub-



Lampoj por mortigi insektojn fabrikataj de la komunuma Fabriko de Elektraĵ Instrumentoj

lika bonstatiga fonduso estas uzata por socia asekuro de la komunumanoj, kolektivaj bonstatigaj aferoj, eduko kaj higieno. Ekzemple, laŭ la praktikata koopera kuracsisistemo, ĉiu komunumano pagas nur 1-2 juanojn por sia tutjara kuracado, kaj oni devas kovri la deficiton per la publika bonstatiga fonduso, kaj krome oni uzas ĝin ankaŭ por subvencii familiojn, kiuj havas malfacilojn pro membro kiu estas varbita

kiel soldato aŭ martiriĝis en batalo kaj maljunulojn, malfortulojn, georfojn, gevidojn kaj kriplulojn sen subtenantaj parencoj.

La enspezo de la produktaj brigadoj kaj komunumoj estas plejparte uzata por plivastigi reproduktadon aŭ por fundamenta konstruado de kampoj aŭ helpi malriĉajn taĉmentojn disvolvi produktadon, kaj parteto de ĝi estas uzata por kolektivaj

bonstatigaj aferoj de la komunumanoj.

En distribuado la produktaj taĉmentoj praktikas la principon "de ĉiu laŭ lia kapablo, al ĉiu laŭ lia laboro; pli da pago por pli da laboro; al nelaborulo ne manĝdono". Komunumanoj, kiuj partoprenas en kolektiva produkta laboro, estas pagataj laŭ la labor-poentoj ricevita laŭ la kvanto kaj kvalito de la farita laboro. La virinoj ricevas saman

rekompenccon por sama laboro kiel la viroj. La kadroj de la produktaj brigadoj kaj produktaj taĉmentoj estas same rekompencataj por sia plenumo de kolektiva produkta laboro kiel la komunumanoj, kaj ankaŭ tiuj, kiuj laboras en industriaj entreprenoj de la komunumanoj kaj produktaj brigadoj, estas same pagataj laŭ la ricevita laborpoentoj.

Sub la kondiĉo de aktiva disvolvo de la kolektiva ekonomio kaj garan-

tio de ĝia absoluta supereco, la popolaj komunumanoj permesas kaj kuraĝigas la komunumanojn disvolvi hejmajn flankokupojn en postlabora tempo kaj ferioj por pliiĝi la sociajn produktadojn, la enspezon de komunumanoj kaj vigligi la kamparan merkaton. Tiaj flankokupoj estas kultivado de privata parceleto, bredado de dombrutoj kaj kortobirdoj, metiartaj laboroj, kolektado de drogherboj, fiŝado, bredado de silk-raŭpoj kaj abeloj k.t.p. La enspezo por tiaj okupoj tute apartenas al la komunumanoj.

Angulo de komunuma forstokultivejo de Kjuangiaŭ-gubernio de Anhuj-provinco



La komunumanoj ĝuas rajtojn de politiko, ekonomio, kulturo kaj porviva bonstatigo. La komunuma revolucia komitato protektas la vivrimedojn de la komunumanoj inkluzive de loĝejo, mebloj, vestoj, litkovriloj, bicikloj, kudromaŝinoj ktp. La komunumanoj ankaŭ rajtas havi deponitan monon en banko kaj etajn agrikulturajn instrumentojn.

La diversnivela organizo de popola komunumo laboras laŭ la principo de demokratia centralismo. La vastaj amasoj de komunumanoj ĝuas grandampleksan demokratian rajton. La diversnivelaj potencorganoj de popola komunumo estas la kongresoj de komunumo kaj brigado kaj la komunumana kongreso de produkta taĉmento, en kiuj la gravaj aferoj en la sferoj de komunumo, brigado kaj produkta taĉmento estas diskutitaj kaj deciditaj en difinita tempo.

En la pasintaj dudek jaroj, direktate de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la popolaj komunumanoj ludis gravan rolon en akvoutiliga konstruado, disvolvo de produktado, ekonomia kaj kultura konstruado de la kamparo, plibonigo de kamparana vivo kaj per tio manifestis sian avantaĝon kaj prezentis belan perspektivon de la socialisma nova kamparo.



Pli ol centmil pekinaj popoloj varme bonvenigas la rumanajn gastojn starante ĉe ambaŭ flankoj de la vojo.

Vizito de Prezidanto Ceaurescu al Ĉinio

de Duan Gi

EN majo ĉie prosperis arboj kaj floroj en Pekino. En tiaj belaj tagoj Nicolae Ceaurescu, ĝenerala sekretario de la Rumana Komunista Partio kaj prezidanto de la Rumana Socialisma Respubliko, kaj lia edzino Elena Ceaurescu faris oficialan amikan viziton al Ĉinio laŭ la invito de Hua Guofeng, prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉefministro de la Stata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko. Tio estis grava evento en la historio de la amika rilato inter la du partioj kaj du registaroj de Ĉinio kaj Rumanio.

En la 15-a de majo Pekino dronis en varma atmosfero de bonvenigo. Super ĉefaj stratoj de la urbo estis disaŭdigataj ĉinaj kaj rumanaj

kantoj. Sur altaj domoj pendis grandegaj rubandoj kun sloganoj kiel ekz. "Firman subtenon al la rumana popolo en la justa batalo por defendi la nacian sendependecon kaj ŝtatan suverenecon!", "Firman subtenon al la landoj kaj popoloj de la tria mondo en la justa batalo kontraŭ hegemonio!" kaj "Vivu la revolucia solidareco kaj batala amikeco de la du partioj, du registaroj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Rumanio!". Sennombraj naciaj flagoj de Ĉinio kaj Rumanio kaj brilkoloraj flagoj flirtis en vento. Pli ol centmil popoloj de diversaj rondoj en festaj vestoj kolektiĝis sur la aerodromo, Tiananmen-placo, ambaŭflanke de la stratoj kaj antaŭ pordo de la gasta domo por bonvenigi



Kamarado Hua Guofeng manpremas kun Kamarado N. Ceausescu.

Kamaradon Ceausescu, gloran senditon el la heroa lando kaj gvidanton amatan de la rumana popolo.

Je la 11-a horo antaŭtagmeze, la speciala aviadilo de Kamarado Ceausescu kaj lia edzino kaj aliaj honorindaj gastoj malrapide surteriĝis sur la Ĉefurba Aerodromo, super kiu flirtas la naciaj flagoj de Ĉinio kaj Rumanio. Apenaŭ Kamarado Ceausescu kaj lia edzino eliris el la kajuto, ili estis varme bonvenigataj de Prezidanto Hua Guofeng kaj Vicprezidantoj Deng Hiaŭping, Li Hiannian kaj Vang Donghing. Premante la manon de Kamarado Ceausescu,

Prezidanto Hua diris kun ĝojo: "Varman bonvenigon al vi!" Kaj la lasta diris: "Mi tre ĝojas vin vidi." Post tio du geknaboj prezentis al Kamarado Ceausescu kaj lia edzino freŝajn florojn. Kaj la lastaj kisis kun rideto la infanojn.

Sur la aerodromo okazis solena bonveniga ceremonio. La armea orkestro ludis la naciajn himnojn de Rumanio kaj Ĉinio. Akompanate de Kamarado Hua Guofeng, Kamarado Ceausescu revuis la honoran gvardion. Kiam Kamarado Ceausescu kaj lia edzino kaj aliaj rumanaĵ kamaradoj intervidiĝis kun la bonvenigantaj ama-

soj, sur la aerodromo tondris tamburado kaj gongado.

Poste la rumanaj gekamaradoj forlasis la aerodromon por veturi al la urbaj kvartaloj. Post kiam la veturiloj de la gastoj atingis la koloran bonvenigan arkon starigitan oriente de Tian-anmen-pordego, Kamarado Ceausescu kaj lia edzino ŝanĝis sian aŭton por akcepti en senkovrila aŭto saluton de la amasoj starantaj ambaŭflanke de la stratoj, akompanate de Kamarado Hua Guofeng.


La pli ol cent mil bonvenigantoj varme svingis al ili ĉinajn kaj rumanajn naciajn flagojn, florbukedojn kaj kolorajn rubandojn. Kiam la aŭtoj de la gastoj eniris Tian-anmen-placon, ili troviĝis en ankoraŭ pli varma bonveniga atmo-

fero. Ses mil geknaboj formis per florbukedoj vorton "Bonvenigon" en la rumana kaj ĉina lingvoj sur la revuaj altanoj ambaŭflanke de Tian-anmen-pordego. Preskaŭ dek mil profesiaj kaj amatoraj artistoj ludis *Dancon de Koloraj Lanternoj*, *Dancon de Teksisinoj* kaj *Dancon de Florvazoj* kaj prezentis akrobataĵojn, *Drakan Dancon* kaj *Leonan Dancon* kun nacia stilo. Iuj el ili en rumanaj kostumoj dancis rumanan popolan dancon. Ĉie, kien la senkovrila aŭto de Kamarado Ceausescu atingis, aŭdiĝis huraoj kaj kantoj. Nekalkuleblaj koloraj balonoj flugis supren al la ĉielo kaj la popolanoj saltadis pro ĝojo.

En la sama vespero la Centra Komitato de KPĈ kaj la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola

Prezidanto N. Ceausescu kaj lia edzino en akompano de Prezidanto Hua intervidiĝas kun bonvenigaj amasoj.





Prezidanto Hua kaj Ĝenerala Sekretario N. Ceausescu en interparolado

Respubliko donis grandan bankedon en la Popola Halo honore al la gastoj.

Kamarado Hua Guofeng kaj Kamarado Ceausescu faris varmajn paroladojn en la bankedo. Kamarado Hua Guofeng diris, ke la amikeco inter Ĉinio kaj Rumanio estas kune kulturita de la amata gvidanto de la rumana popolo Kamarado Ceausescu kaj la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong kaj la amata Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj. La vizito de Kamarado Ceausescu, kun la partia kaj registara delegacio sub sia gvido, al Ĉinio en 1971 aldonis brilan paĝon en la historio de rilato inter Ĉinio kaj Rumanio. Kaj lia ĉifoja vizito certe puŝos la amikecon inter Ĉinio kaj Rumanio al nova nivelo.

Kamarado Hua Guofeng diris, ke Rumanio pledas por tio, ke ĉiuj landoj ĉu grandaj aŭ

malgrandaj estu egalrajtaj, aferoj de diversaj landoj estu mastrumataj de iliaj propraj popoloj, kaj internaciaj aferoj estu solvataj tra egala interkonsiliĝo de diversaj landoj, kaj oponas kontraŭ tiranado de grandaj landoj super malgrandaj, subpremado de potencaj al malfortaj kaj ekspluatado de riĉaj al malriĉaj, kaj per tio ĝi ludis aktivan rolon en la internacia batalo. Nun la socialisma Rumanio majeste staras inter la nacioj de la mondo kiel prospera suvereneca lando.

En sia parolado Kamarado Ceausescu montris, ke lia ĉifoja vizito havas grandan signifon en la historio de solidareca rilato inter la du partioj, du registaroj kaj du popoloj de Rumanio kaj Ĉinio kaj estas utila al la socialisma konstruado kaj ĝeneralaj aferoj de socialismo, kunlaboro kaj paco de la du landoj. Li ĝojis pro la sukcesoj atingitaj de la ĉina popolo en la entu-

ziasma laboro por efektivi la grandan celajn konstrui Ĉinion en prosperan socialisman potencon en la fino de la kuranta jarcento. Li diris, ke la Komunista Partio de Ĉinio estrata de Kamarado Hua Guofeng kreive aplikas principon de Marksismo-Leninismo en Ĉinio laŭ ĝiaj konkretaj statoj, unuigas ĉiujn fortojn kaj gvidas la grandan ĉinan nacion kun naŭcent milionoj da popoloj por grimpi novan altaĵon de progreso, civilizacio, socialisma bonstatigo kaj feliĉo.

En la bankedo ĉiam regis varma kaj amikeca atmosfero.

Dum la vizitado Prezidanto Hua Guofeng kaj Prezidanto Ceausescu faris sinceran kaj amikan interparoladon pri pliapaŝa disvolvo de la amika kunlaboro inter la du partioj, du registaroj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Rumanio kaj pri internaciaj problemoj komune interesaj, kaj atingis plenan sukceson. La du landoj ankaŭ subskribis novajn interkonsentojn pri ekonomia kaj teknika kunlaboro kaj dokumentojn pri konsula kaj kultura kunlaboro.

En la 17-a de majo, Kamarado Ceausescu kaj lia edzino kaj la aliaj rumanaĵ gastoj, akompanate de membro de la Politika Buroo de CK de KPC kaj vicĉefministro de la ŝtata Konsilantaro Geng Biaŭ kaj ministro de eksteraj aferoj Huang Hua, iris al la Memorhalo de Prezidanto Maŭ por montri respekton al la korpo de Prezidanto Maŭ Zedong. Kamarado Ceausescu prezentis florkronon al la sidanta statuo de Prezidanto Maŭ, sur kiu kovriĝas standardoj de la Rumana Komunista Partio kaj la Rumana Socialisma Respubliko.

Kamarado Ceausescu kaj lia edzino kaj aliaj rumanaĵ kamaradoj vizitis fabrikojn, trupojn kaj sciencajn instituciojn kaj rigardis artan kaj sportan prezentadojn en Pekino, Kantono kaj Hangĝoŭ kaj amike intervidiĝis kun popoloj de diversaj socitavoloj de nia lando. Ĉie, kien iris Kamarado Ceausescu, li estis ekstreme solene kaj varme akceptata.



La rumanaĵ gastoj ĉeestis vesperan kunvenon de gimnastika kaj arta prezentado kaj fine fotiĝis kun la sportistoj kaj aktoroj.



La rumanaĵ gastoj vizitas la Okcidentan Lagon de Hanĝoŭ.

La rumanaĵ gastoj vizitas Fizikan Instituton de la Ĉina Akademio de Sciencoj.



Bolanta urbo de fero kaj ŝtalo

EN Liaŭning-provinco de nordorienta Ĉinio sur la norda bordo de Bohaj-golfo, sin trovas fama urbo de fero kaj ŝtalo. Tie staras aro da altfornegoj, la ĉielo brilas pro la “matenruĝo” de la gigantaj martin-fornegoj elverŝantaj ŝtalfluon, vagonaroj kaj kamionoj ŝarĝitaj per feraj kaj ŝtalaj materialoj, brulaĵoj kaj produktaĵoj kuras sur la fervojoj kaj ŝoseoj . . . Ĝi estas la urbo Anŝan, kie sidas la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio kun 67 fabrikoj kaj minejoj.

La nomita kompanio jam trapasis 63 jarojn post sia fondiĝo, tamen ĝi komencis marŝi per gigantaj paŝoj nur en la 28 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Dum tiu ĉi periodo, la Anŝan-anoj konstruis kaj restarigis 11 altfornegojn, konstruis 26 Martin- kaj Besemer-fornegojn kaj kelkajn ferminejojn. Tiu kompanio jam fariĝis kompleta fera-ŝtala kombinumo. De multaj

jaroj, la produktokvanto de ŝtalo de tiu urbo konsistigis pli ol kvinonon de tiu de la tuta lando.

LA GIGANTO HIERAŬ KAJ HODIAŬ

Antaŭ la frakasigo de la kontraŭpartia “kvar-persona bando”, la fidelaj veteranaj laboristoj, labormodeloj kaj partianoj estis kalumniitaj kiel “tipaj praktikantoj de produktivismo” kaj la fame konataj specialistoj, kiuj faris kontribuon en ŝtalprodukta tekniko de nia lando, estis atakitaj kiel “burĝaj reakciaj aŭtoritatuloj”. Kaj sekve, la produktokvanto de fero kaj ŝtalo de tiu kompanio reduktiĝis ĉiujare ekde 1974, kaj ĝi ne povis plenumi la produktan taskon difinitan de la ŝtato en tri sinsekvaj jaroj. En tiuj nubozaj jaroj, la popolo maltrankvilis pro la stagnado kaj malkresko de ĝia produktado.




Fan Gongmo (meze), vicĉefingeniero rakontas sian sperton al junaj laboristoj.

Post kiam la Centra Komitato de la Partio, estrata de Prezidanto Hua Guofen, frakasis la “kvarpersonan bandon”, la Anŝan-a Fera kaj Stala Kompanio ekhavis sunbrilajn tagojn. En la batalo por kritiki la “kvarpersonan bandon”, la gvidantaro de la kompanio estis reordigita kaj denove boliĝis la minejoj kaj laborejoj. Nemalmultaj veteranaj laboristoj diris heroe:

“Por unu tagaŭroro, mi faras du deĵorojn!” Tio spegulis la ardan entuziasmon de la amasoj por socialismaj revolucio kaj konstruado. La sciencistoj kaj teknikistoj levis sian kapon. Nun, la lumoj en la domo de la metalurgia instituto denove brilas tra la noktoj, la nombro de la gravaj sukcesoj atingitaj en scienca esplorado post la frakaso de la “kvarpersona bando” egalas

*Angulo de la
Anŝan-a Fera kaj
Stala Kompanio*





La Unua Laminejo de Krudaj Stalpecoj de la Anŝan-a Fera kaj Stala Kompanio estas en produktado.

al tiu totala en la antaŭaj dek jaroj. La entuziasmo de la Anŝan-anoj ŝprucas vulkane. La produktado de tiu kompanio kreskadas ekde aprilo de 1977. Post antaŭdata plenumo de la ŝtataj ekonomiaj planoj en la pasinta jaro, la kompanio denove superplenumis la ŝtatan planon de ĉiuj ĉefaj produktaĵoj en la unua sezono de la kuranta jaro.

NOVA ASPEKTO DE ALTFORNEGO

En la prospera Anŝan-a Fera kaj Stala Kompanio, aparte atentinda estas tio, ke la heroaj konstruantoj kuraĝe rekonstruis la 7-an kaj 8-an altfornojn en unu gigantan novtipan altfornegon. Tio estis grava paŝo farita de la kompanio

por altigi la produktivon de gisfero. La kapacito de la nova 7-a altfornego estas 2,580 kubmetroj, pli granda ol tiu de la antaŭaj du altfornoj. La projektita jara produktokvanto de gisfero estas 1,500,000 tunoj, t. e. 1.5-oblo de tiu de la antaŭaj du altfornoj. La antaŭa 7-a altfornego estis konstruita en 11 monatoj, sed la nova 7-a altfornego en nur 9 monatoj. Tia rapideco estas senprecedenca en la historio de konstruado de altfornoj en nia lando.

Al la nova 7-a altfornego, oni aplikis novtipan supraĵon de tri sonoriloj kun malsamaj grandecoj. Ĝia supereco estas tio, ke la fornosupra premforto povas esti duobligita. Dank' al tio, tiu altfornego povas ĉiujare pliprodukti pli ol

170,000 tunojn da gisfero kaj ŝpari pli ol 14,000 tunojn da koakso. Oni diris al ni, ke kiam la supraĵo de la altfornego estis muntita, eksperti-zisto konstatis, ke ĝia kvalito atingis la projekti-tan normon kaj ĝi povas esti ekuzata por pro-duktaĵo. Sed la estro de la muntista grupo Gi Guoven kaj liaj grupanoj ne volis fini sian la-boron, ĉar unu el la ok apogaj punktoj inter la granda sonolilo kaj la funelo delokiĝis je 4 milimetroj. Kvankam tiu devio estas permesata, tamen maljuna Gi kaj la laboristoj opiniis, ke nepreciza muntado rekte influas la hermetikecon de la altfornego kaj la premforton de ĝia supraĵo. Ili diris, ke ili nepre korektos la 4-milimetran delokiĝon, eĉ se necesus milfoja ĝustigo. Kaj en frosta vento ili grimpis al la fornega supraĵo, pli ol 20-foje movis la 45-tunan sonorilon, faris pli ol centfojan ĝustigon kaj fine korektis la devion.


Kial oni nomis la novan fornegon ankaŭ la 7-a altfornego? Ĉar tiu altfornego havas gloran historion. Prezidanto Maŭ foje sendis al la

antaŭa 7-a altfornego gratulan telegramon kaj Ĉefministro Ĝoŭ foje ĝin inspektis. Depost la ekproduktado en la pasinta jaro, la altfornego funkcias normale. Rigardante la feran torenton el la giganto, oni kvazaŭ vidas la efektiviĝantan esperon de la revoluciaj antaŭuloj kaj la hero-econ de la ĉinaj laboristoj.

KONKURE ANTAŬEN

La laboristoj kaj oficistoj de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio firme decidis rapidi en lernado de Daking kaj ili disvolvis socialisman laboran konkurson inter fabrikoj, laborejoj kaj skipoj. Por produkti multe da ŝtalo kaj ŝtalaĵoj kaj kompensi la perdon kaŭzitan de la "kvar-persona bando" en produktado de fero kaj ŝtalo, ĉiuj strebis energie antaŭen kaj akcelis la dis-volviĝon de produktado.

En la minejo de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio troviĝas fama taĉmento de Vang Gjunŝaŭ. Depost sia fondiĝo en 1972, tiu labor-



Vang Gjunŝaŭ (la dua de dekstre), sekretario de la partia komitato de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio en ĉiela ferminejo.

taĉmento ĉiujare faris novan kontribuon al la ŝtato kaj fariĝis ruĝa flago en la metalurgia fronto de la tuta lando. En 1977, tiu taĉmento denove gajnis la ĉampionecon en ekspluatado de subĉiela minejo de la tuta lando koncerne al la laborefikeco de 4-kubmetra elektra fosilo, tutjara endrila kvanto kaj laborproduktiveco. En la unu sezono de la kuranta jaro, ĝi denove superplenumis sian taskon de fosado kaj transportado de ercoj je 30 procentoj.

Nun ni jetu rigardon ankaŭ al la fabriko de grandtipaj ŝtalajoj. Ĝi estis unuo malfacile rebonigebla de la kompanio. Ĉar ĝia ĉefo ligiĝis al la "kvarpersona bando", li energie faris intrigajn aktivadojn en la fabriko kaj subpremis la produktan aktivecon de la amasoj. Sekve de tio, tiu laminatejo produktanta ĉefe relojn kaj aliajn grandtipajn ŝtalajojn ne povis plenumi la ŝtatajn planojn en tri kaj duona jaroj depost la jaro 1974 kaj la laboristoj moke nomis la fabrikon kiel "grandan urson". Sed post reordigo de ĝia gvidantaro en la pasinta jaro, ĝi energie lernis de Daking kaj en la lasta duonjaro ĝia produk-

tado jam superis la plej bonan nivelon atingitan en 1973. Dank' al sia klopodado, tiu fabriko ne nur ŝtopis la mankon en produktokvanto de la unua jarduono, sed eĉ plenumis la tutjaran produktan taskon je 6 tagoj antaŭdate.

Ankaŭ la ŝanĝiĝo de la Dua Laminejo de Krudaj Ŝtalpecoj estas ĝojinda. Pro ĝenado de la "kvarpersona bando" en la pasinteco, ĝi ne povis plenumi la ŝtatan planon dum 18 sinsekvaj monatoj. Ekde aprilo de la pasinta jaro, tajdis la socialisma entuziasmo de ĝiaj laboristoj kaj oficistoj kaj rapide leviĝis ĝia produktado. En la unua jarduono, ĝi kompensis la perdon kaŭzitan de la "kvarpersona bando" kaj en la posta duonjaro ĝia produktado jam atingis la nivelon projektitan por la jaro 1980.

Post klopodado de iom pli ol unu jaro, la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio ricevis tre grandan ŝanĝiĝon. En la pasinta jaro, la tuta kompanio superplenumis la ŝtatan planon, kaj je la 22-a de marto ĉijare, ĝi jam estis oficiale honore nomata de la Metalurgia Ministerio Daking-tipa entrepreno.

La 7-a altforno de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio elveŝas ferlikvon



Toraka kirurgo Hin Juling

de BI GING kaj HUANG VEJ

ANTAŬ 39 jaroj, Doktoro N. Bethune venis kun sia batalkampara kuraca taĉmento al Bajjangdian, la fama hejmloko de surakvaj gerilaj taĉmentoj en centra Hebej-provinco. Iutage, li prenis por si bovlon da fiŝsupo, sed tuj post ektrinko li demandis surprizite:

“Nu, kiu metis salon en la supon?”

“Mi,” respondis timeme soldato 18-jara.

“Nun sur la fronto mankas kuraciloj kaj salo. Eĉ kelkaj grajnoj da salo povas savi unu vivon. Ni ne devas ĝin malŝpari senkonsidere!”

La severa kritiko kaj la senegoisma spirito de Kamarado N. Bethune restis neforgeseblaj por tiu batalanto de la Okavoja Armeo.

Kaj tiu juna batalanto nomata Hin Juling nun jam fariĝis estro de la torakokirurgia sekcio de la Pekina Tuberuloza Instituto. Antaŭ nelonge, ni intervjuis lin en la nomita instituto.

Tiam Hin Juling estis en inspektado de malsanula ĉambro. Tie kuŝis kamparano-paciento kun spiraparato. Li ne povis paroli, kaj kiam li vidis Hin Juling, li starigis sian polekson kun ruliĝantaj larmoj en la okuloj.

“Li laŭdas vin, Doktoro Hin,” diris flegistino.

Kaj poste li etendis unu montrofingron. “Doktoro Hin,” rimarkigis la flegistino, “li dankas vin, ke vi savis unu plian vivon.”

La flegistino diris al ni, ke dum operaciado al tiu paciento, kiu multe sputis sangon, subite kreviĝis lia aorta tumor kaj sango ŝprucadis el ĝi. En la kriza momento, Hin Juling tuj premis la vundon per fingro kaj samtempe diris, ke oni venigu kuraciston de frata hospitalo por helpo. La fingro de Doktoro Hin senmove premadis ĉe la loko kun konvena forto, ĉar malforta premo

ne povis ĉesigi la sangadon kaj tro forta premo povis malhelpi la cirkuladon de sango. Kiam alrapidis kuracisto de frata hospitalo, lia fingro jam rigidiĝis, sed post 11-hora operaciado, la paciento estis savita.

Aŭdinte la historion, ni ĵetis admirajn rigardojn al Doktoro Hin, tamen li nur ridetis apenaŭ rimarkeble kaj diris: “Tiu sukceso rezultiĝis ĉefe el la helpo de frata hospitalo.”

Hin Juling ĉiam tenas en sia memoro la averton de Doktoro N. Bethune plenan de proleta sentimento: Por kirurgo, tempo signifas vivon, signifas venkon! Perdo de tempo signifas perdon de ĉio.

Por savi pacientojn, li ne avaras je sia tempo. En sennombraj fojoj li faris operacion de dekkelkaj horoj. Por savi malsanulon en krizo, li povas laboradi plurajn tagojn kaj noktojn en malsanula ĉambro. Li ofte urĝas aliajn al ripozo, tamen li mem flegadas kaj observadas la pacientojn.

En savado de pacientoj, li tamen estas tre ŝparema je tempo. Dum operaciado, li zorge laboradis por plejble eviti nenecesajn movojn kaj mallongigis la tempon por amputo de pulmo de pli ol tri horoj ĝis iom pli ol unu horo. Iuj eksterlandaj specialistoj diris post rigardo de lia operaciado, ke li operaciis “pure kaj lertege”.

La Pekina Tuberuloza Instituto funkciigas relative grandan dependan klinikon de toraka kirurgio. Multaj pacientoj de gravaj malsanoj de pulmo kaj brusto vizitas ĝin. Inter ili troviĝis nemalmultaj pacientoj de longa malsanado kaj iuj jam falis en krizan staton kaj sin turnis al la kliniko kun sia lasta espero tre tre malgranda. Ĉu oni akceptu kaj kuracu tiajn krizajn malsanulojn? Al tiu demando Doktoro Hin donis

respondon jesan tute sen hezito. Kaj krome, li ankaŭ akceptis pacientojn, kiujn aliaj hospitaloj rifuzis pro manko de necesaj kondiĉoj. Iuj ne volis sin meti al risko kaj timis malsukceson. Hin Juling diris je tia okazo: "Ni okupiĝas pri toraka kirurgio, se ni ne akceptus ilin, do al kiuj ili sin turnu por helpo? Malfacile, sed ni povas serĉi rimedojn. Por solvi malfacilojn, ni povas peti helpon de frataj hospitaloj."

Informiĝinte, ke ni venas por kolekti informojn pri avangardaj faroj de Doktoro Hin, iu paciento alvenanta por reekzameno diris al ni: "Mi mem estas savita de Doktoro Hin." Tiu maljunulo kun aĝo de pli ol 60 jaroj longe suferis de pusado en la maldekstra flanko de sia brusto. Li febradis, pusadis tra la vundo, perdis preskaŭ sian tutan forton kaj spiris malfacilege. Fine li estis transsendita de alia hospitalo al la kliniko. Kion fari? Hin Juling interkonsiliĝis kun aliaj kuracaj laborantoj kaj venis al la opinio, ke la sola aplikebla rimedo estas fari operacion. Tio sendube estis tre riska paŝo, ĉar la paciento suferis ankaŭ de kormalsano kaj eble ne povos elteni la operaciadon. Hin Juling senhezite decidis klopodi por sukceso kvankam nur malgrandega. Unuflanke li bone persvadis la kolegojn, aliflanke li faris bonan preparon por eventuala urĝa bezono kune kun ili. Komenciĝis la operacio. Hin Juling lerte malfermis la bruston, malkovris la lokon de la malsano, zorge faris detranĉadon laŭeble malgrandigi vundon. Por preventi teruran sangadon, li aplombe serĉadis angilojn en la kungluigintaj malordaj histoj por ĝustatempe ĉesigi sangadon kaj ne perdi tro multe da sango al la maljunulo. Kaj post pli ol du horoj, la operacio estis finita kun plena sukceso. Post certatempa flegado, la paciento tute resaniĝis kaj iris hejmen. Nun oni apenaŭ povas imagi al si, ke la vivecplena maljunulo sonore parolanta estis en morta krizo antaŭ kelkaj jaroj, kiam li estis portita en la instituton.

Estis multaj aferoj, kiuj manifestis la ekstreman respondecon de Doktoro Hin pri laboro kaj lian varmkorecon al la kamaradoj kaj popolo. Laborante kiel estro de la sekcio de toraka kirurgio de la Pekina Tuberkuuloza Instituto en la pasintaj kelkaj jaroj, Hin Juling kuracis 45

gravajn pacientojn, kiuj perdis pli ol 5,000 mililitrojn da sango, el kiuj 42 estis savitaj. Sed en la pasinteco, 20 procentoj de tiaj kazoj finiĝis per morto.

Iuvespere, ni interparolis kun Doktoro Hin pri risko en savado de krizaj pacientoj. Li ekridetis apenaŭ rimarkeble kaj ekrakontis al ni pri okazajoj dum la militaj jaroj. Li propraokule vidis, ke Kamarado N. Bethune urĝe savis vunditojn en kaduka templo. Tiam la situacio estis tre danĝera, kaj Kamarado He Long, kiu estis la fronta komandanto siatempe, persone skribis noton kaj ĝin alsendis per kuriero por sciigi, ke la kuraca taĉmento retiriĝu en 15 minutoj. Tamen Doktoro N. Bethune ne konsentis tuj foriri kaj nepre volis unue ĉesigi la sangadon de la vunditoj. Kiam iu provis lin persvadi refoje, li ekkoleretis: "Ĉu nia retiriĝo ne estas por sekureco? Tamen la vunditoj, la kontraŭfaŝismaj batalantoj, estas en malsekureco. Ĉu tio estas tolerebla?" Kiam la vunditoj ricevis zorgan traktadon kaj komencis retiriĝi, la malamikoj jam komencis sin jeti al ili kaj siblantaj obusoj eksplodis en la ĉirkaŭaĵo.

"Doktoro N. Bethune vere havas superhoman kuraĝon kaj ĝisfundan sinoferan spiriton! Kian riskon do ni havas nun!" Per tio Hin Juling finis sian rememoron kaj respondis al nia demando.

Por sukcese kuraci pacientojn en grava malsano, Doktoro Hin Juling ne nur estas riskema, sed ankaŭ klopodadas por plialtigi sian kuracan arton, ĝuste kiel N. Bethune faris.

Prevento de apero de bronketa brustmembrana fistulo post fortranĉo de pulmo estas malfacila ŝlosila tekniko. Unu el la kaŭzoj de apero de tia fistulo estas la apliko de tradicia kunkudra metodo post pulmdetranĉa operacio. Tia fistulo longe nekuracebla estas tre dolora al la paciento kaj eĉ povas kaŭzi kripliĝon kaj morton. Rigardante la pacientojn longe tenatajn en la hospitalo pro tia fistulo, Hin Juling sentis sin kulpa pro nebona plenumo de la devo de toraka kirurgo kaj firme decidis solvi tiun malfacilan ŝlosilan problemon. Li organizis la kuracajn laborantojn en tiu sekcio por studi pli ol 400 artikolojn en- kaj eksterlandajn pri tiu


temo, fari penetrivan analizon pri la strukturo kaj resaniĝemo de bronketoj, zorge kompari kazojn kun aŭ sen apero de fistulo, kaj sur la bazo de resumado de siaj praktikaj spertoj ili fine trovis la kaŭzon de estiĝo de tia fistulo kaj kreis novan metodon de kunkudro de bronketo je ĝia mukmembrano ĉe la amputa fino. En la lastaj dekkelkaj jaroj, ili aplikis la novan kunkudran metodon al pli ol 3,000 kazoj, kaj nur al 3.2 milonoj el ili okazis fistulo.

En tekniko, Hin Juling senĉese elmetas al si novajn postulojn kaj la naskiĝo de la tekniko de pulma amputo sub anestezo per unu akupunktura pinglo elstare montris lian revolucion stilon en grimpado al nova teknika altaĵo.

Tiel frue kiel en la jaro 1958, Doktoro Hin jam provis fari amputon de plumo sub akupunktura anestezo, sed fiaskis. Poste, li iris al aliaj lokoj por lernado kaj akiris sperton de unuapafa sukceso de frataj institucioj. La trovita metodo postulis uzi pli ol 40 pinglojn al la membroj de la paciento kaj kvar helpantoj devis turnadi la pinglojn samtempe. Kvankam tio sukcesigis la operacion, tamen la paciento devis multe suferi pro longtempa senmoviĝo de la korpo. Doktoro Hin decidis redukti la nombron de la uzataj pingloj. Kune kun akupunkturistoj li studis la arton de akupunkturo kaj komencis eksperimenton de redukto de pinglonombro.

Por trovi novajn pikpunktojn efikajn, li faris provojn unue sur sia propra korpo. Liaj brakoj ŝveliĝis pro pikado, do li ekprovis sur siaj gamboj, kaj kiam ankaŭ la lastaj ne taŭgis por tio, li metis varmigajn tukojn sur ilin kaj poste daŭrigis la provon post malŝveliĝo. Li prove pikis preskaŭ ĉiujn punktojn sur sia korpo, kiuj efikas por mildigi doloron en la torako.

La nombro de la uzataj pingloj senĉese reduktiĝis: 32, 16. . . Foje, Doktoro Hin subite malsaniĝis je akuta apendicito. Tiam oni ankoraŭ ne havis plensukcesan akupunkturan anestezan metodon por abdomena operacio, tamen li decidis senhezite apliki akupunkturan anestezon por lia operacio. Dank' al tiu operacio, li akiris personan sperton pri la sento kaj efiko de akupunktura anestezo en ĉiuj stadioj, pli bone konis la pacienton sub akupunktura anestezo kaj



Hin Juling (meze) faras operacion de amputo de pulmo.

scipovis pli bone fari eksperimentojn. Post penema klopodado de 6 jaroj, finfine li faris mondan miraklon de amputo de pulmo sub anestezo per unu sola akupunktura pinglo, en la jaro 1971.

Hin Juling, antaŭe malriĉkamparana filo kun klereco de kvarjara studo en elementa lernejo, fariĝis fama toraka kirurgo de nia lando kaj faris sian kontribuon al la popola medicina afero. Li diris: "Estis la Partio kaj la popolo, kiuj ebligis al mi studi en la Ĉina Medicina Universitato de Jan-an en la malfacilaj jaroj de revolucia milito kaj studi eksterlande post la Liberiĝo. Por la afero de la Partio kaj la popolo kaj por konstrui grandan socialisman modernan potencon, mi ĉiam laboros, vivos kaj batalos kiel Kamarado N. Bethune." Nun, Doktoro Hin estas grimpanta altan pinton en transplanto de organoj kaj kuracado de pulma kancero, kune kun la kolegoj de sia sekcio.



ANTIKA TOMBARO PRIFOSITA EN GUANGHI

Lastatempe arkeologoj de la Guanghi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono prifosis 110 antikvajn tombojn de la Periodo de Militantaj Regnoj (475 — 221 a. K.). Ili sin lokas en Jinŝanling de Pingle-gubernio ĉe la malsupra baseno de la pitoreska Ligiang-rivero. Oni elfosis entute pli ol 1,400 objektojn, el kiuj estas ĉefe bronzaĵoj, feraj produktaj instrumentoj kaj vivbezonaĵoj argilaĵoj.

Tiuj belaj kaj delikataj objektoj montris altan teknikon de tiamaĵ forĝado kaj metiarto. Inter ili troviĝas akra bronza spado longa je 0.63 metro kaj larĝa je 0.05 metro. Ĝi estis muldita per du malsamaj specoj de bronzo, malsam-koloraj sur siaj klingoj kaj dorso kaj ornamita per desegnaĵo de besta vizaĝo. La spada tenilo en formo de galopanta ĉevalo surhavas ĉe sia kapo kristallan globeton kun trueto de laĉado.

Tiuj objektoj havas grandan valoron por studi la rilatojn de ekonomio, kulturo kaj politiko inter Guanghi kaj internaj lokoj de nia lando en la Periodo de Militantaj Regnoj.

MUZIKILOJ EL KAMPARANAJ MANOJ

Multaj amatoraj ensembloj de produktaj brigadoj de Hijang-

gubernio havas violonĉelon, violonon kaj aliajn muzikilojn, el kiuj plejparte estas faritaj de komunumanoj el lokaj materialoj.

La profesiaj muzikistoj de la Kultura Domo de Hijang-gubernio donis helpoj al la komunumanoj en muzikilfarado. La muzikilfarejo de tiu gubernio povas fari pli ol 10 specojn de muzikiloj inkluzive de violonĉelo, violono, bivo kaj ksilofono.

GRANDA PROGRESO EN STUDADO DE LA KITAN-A LINGVO


La Nacia Instituto de la Ĉina Sociologia Akademio kaj la Mongolingva Fakto de la Universitato de la Interna Mongolio kune fondis studrondon, kiu lastatempe atingis grandan progreson en studado de la kitan-a lingvo kaj publikigis disertaĵojn kun ĉ. 100,000 ĉinaj ideografiaĵoj "Studo pri la Malgrandaj Kitan-aj Skribsignoj". Laŭ statistiko la lingvo origine havis 378 skribsignojn. Nun, oni jam trovis la sonvaloron de pli ol 130 el ili kaj dank' al tio sukcesis determini la signifon kaj prononcon de pli ol 400 vortoj, identigi ĉirkaŭ 70 morfolo-

giajn elementojn kaj klarigi diversgrade pli ol 20 afiksojn.

"Kitan" estis nomo de iu antikva nacieco en norda Ĉinio. En la komenco de la deka jarcento ĝi fondis Liaŭ-dinastion (907 — 1125 p. K.). Regantoj de la dinastio kreis por si unu post la alia du specojn de skriba signaro imite al la han-a ideogramo — la grandan skribsignaron kaj la malgrandan. En la jaro 1191 la lingvo fariĝis mortinta. Sed konserviĝis multaj valoraj historiaj materialoj skribitaj en tiu mortinta lingvo. Deĉifrado de la kitan-a lingvo estas utila ne nur al kompletigo kaj korektado de eraroj pri "la Historio de Liaŭ-dinastio", sed ankaŭ al studado de historioj kaj lingvoj de aliaj naciecoj en norda Ĉinio, precipe de la historio de la mongola lingvo. Ĝi favoras ankaŭ al solvado de iuj problemoj ne-solvitaj en antikva fonetiko de la han-a lingvo.

Preskaŭ ĉiuj materialoj pri la kitan-a lingvo estis iom post iom trovitaj post la dudekaj jaroj de la kuranta jarcento. En la lastaj 50 jaroj ĉinaj kaj eksterlandaj lingvistoj faris multajn klopodojn kaj atingis certan sukceson en deĉifrado de tiu lingvo.

Dekstre estas malgrandaj skribsignoj de la Kitan-a lingvo, maldekstre Kitan-lingvaj vortoj tradukitaj de ĉinaj instruituloj.





MARBORDA URBO — LIANJUNGANG

Marborda pejzaĝo



Viglaj dokoj

Lianjungang situas sur la suda bordo de Hajĝou-golfo en la norda parto de Giangsu-provinco kaj frontas al la Flava Maro. Ĝi konsistas el kvar urbetoj viciĝantaj de okcidento al oriento kaj ĉe la orienta fino troviĝas la pitoreska natura profunda haveno Lianjungang.

Tiu haveno, kun la alta Juntaj-monto dorsflanke kaj Donghilian-insulo en la fronto kiel natura ŝirmilo, estas kvieta kaj moderklimata, eĉ kiam venĝego kaj ondegoj furtozas surmare. Ĝi estas la fina stacio de la grava fervojo komencita de Urumĉi en okcidenta Ĉinio ĝis la orienta Lianjungang-haveno de nia lando kaj la plej proksima surmara trafika pivoto por ok provincoj de centra kaj nordokcidenta Ĉinio.

La haveno ekkonstruiĝis en 1933. Kvankam ĝi havis siatempe nur unu ankrejon por 3,000-tonela ŝipo, tamen ĝi estis uzata, en pli ol dek jaroj antaŭ la Liberigo, kiel unu el la havenoj, tra kiuj imperiismaj landoj prirabis naturajn riĉfontojn de nia lando.

En la fino de 1948, la haveno revenis en la manojn de la popolo, sed la kajo estis tiel kaduka kaj la naviga vojo ŝtopita, ke mil-tonela ŝipo eĉ ne povis eniri la havenon. Sub la gvido de la Partio oni rapide forigis la sedimentan ŝlimon en la haveno, konstruis staplojn, laboristajn loĝdomojn kaj aliajn instalaĵojn. Ankaŭ pliiĝis ŝarĝ-maŝarĝaj maŝinoj kaj la haveno ricevis novan vivon. En 1973, post kiam Ĉefministro Ĝou Enlaj faris alvokon ŝanĝi la fizionomion de niaj havenoj, ankaŭ tiu haveno estis difinita kiel unu el la ĉefaj konstruendaj havenoj de la ŝtato. Dank' al komuna klopodo de la koncernaj unuoj kaj haven-konstruantoj, kvin ankrejoj por 10,000-tonelaj ŝipoj kaj du ankrejoj por 5,000-tonelaj ŝipoj sinsekve konstruiĝis en kvar jaroj. Nun ŝipoj, ĉu ĉinaj aŭ fremdlandaj, senĉese iras en aŭ el la haveno, oceanaj ŝipoj ankras en la dokoj, novaj specialaj fervojlinioj etendiĝas al la dokoj ekipitaj de multaj pordaj arganoj kaj diversaj ŝarĝ-maŝarĝaj maŝinoj vikle laboardas.

Sekve de la disvolviĝo de la konstruado de la haveno, oni konstruis ĉe la piedo de Juntaj-monto fabrikojn, laboristajn loĝdomojn, magazenojn kaj lernejojn. Ankaŭ ĝiaj agrikulturo kaj fiŝado, la marborda sal-farejo longa je 50 km. kaj laminaria kulturado multe disvolviĝis.

La haveno






Angulo de Lianjungang



Laboristaj loĝdomoj ĉe la piedo de Juntaj-monto






Kulturado de laminarioj



Plukado de fame konata nebul-teo sur Juntaj-monto



Salo

Geedziĝo de juna paro

TRE rapide disvastiĝis en la tuta Hiaŭgiahe-brigado en la ĉirkaŭurbo de Pekino la novaĵo, ke He Hiuĵing kaj Ma Ĉongli geedziĝos.

Se vi demandus 26-jaran He Hiuĵing kiel ŝi enamiĝis al Ma Ĉongli, ŝi dirus al vi, ke ilia amo komenciĝis de riparo de la disfalta muro de ŝia domo. Ĉar ŝia patro estis tro maljuna kaj ŝi ne havas fraton, tial ŝia familio ne havis la eblecon mem rekonstrui la muron. Pro tio la brigado alsendis helpantojn, inter kiuj estis junulo nomata Ma Ĉongli. Lia sinteno, sperteco kaj energipleneco en laboro altiris atenton de malgranda He. Kaj de tiam, la junulo ofte venis al ŝia hejmo por helpi, kiam tie estis peza fizika laboro. Kaj poste ili kune partoprenis en diversaj aktivadoj okazigitaj de la brigado kaj ofte kune promenis kaj interbabilis. Tiamaniere la amikeco inter ili profundigis tagon post tago kaj fine ili geedziĝis.

Novtipa estis ilia geedziĝa ceremonio. Kvan-kam nun multaj ĉinaj gejunuloj geedziĝas en tia maniero, tamen tio estas tute nova por la bopatrino de malgranda He. kiu havis tute malsaman vivosperton.

En la vespero antaŭ la geedziĝo, la gefianĉoj gastigis respektive en siaj hejmoj siajn amikojn kaj kolegojn. En la sekvanta tago, kelkaj parencoj de malgranda Ma iris al la hejmo de malgranda He por bonvenigi la fianĉinon. Sur la revena vojo ili gaje babilis kun la fianĉino en la mezo kaj la lasta estis aparte ĝoja.

En la dormĉambro freŝe blankigita por la nova paro vidiĝis belaj ornamaĵoj, unu ŝranko kun kvin tirkesto memfarita de la novedzo, kiu estas lignajisto de la produkta brigado; sur la lito estis kvar novaj vatitaj litkovriloj silkaj; sur la skribotablo estis transistora radioricevilo kaj bela vektorloĝo. Ekster la ĉambro staris biciklo.

Tre simpla estis la geedziĝa ceremonio. En la malnova Ĉinio, la novaj geedzoj devis unue riverenci al la ĉielo kaj la tero, poste al la porkultaj nomtabuletoj de la mortintaj praaĵoj, kaj fine al la gepatroj de la edzo. Tamen la nova paro nur riverencis al la gepatroj kaj poste sidiĝis kune kun la aliaj por tagmanĝi. Inter la riĉaj pladoj troviĝis laŭ la tradicio ankaŭ granda bovlo da vermiĉelo simbolanta longan amon de nova paro.

Post la tagmanĝo, la novaj geedzoj iris al la gepatroj de la novedzino por ilin saluti.

En la sekvanta tago, malgranda He ekhelpis la bopatrino fari manĝaĵojn kaj purigi ĉambrojn. Antaŭe malgranda He nomis ŝin onklino, kaj nun patrino. Ekde tiam la geedzoj kune laboris. Kiam ili ellitiĝis matene aŭ hejmen revenis tagmeze, manĝaĵoj estis jam pretaj. Tio estas tute ordinaro por Hiuĵing, sed ŝia bopatrino diris al ŝi, ke por ŝi, multe suferinta en la malnova socio, la diferenco inter la hodiaŭo kaj la pasinteco similas al tiu inter la paradizo kaj la infero.

En la malnova Ĉinio, precipe en la kamparo, la geedziĝo estis decidita de la gepatroj kun profesiaj svatistinoj kiel perantoj. Antaŭ la geedziĝo, la gejunuloj ne povis intervidiĝi por ne paroli pri interkoniĝo. Por preni edzinon la viroj devis elspezi multe da mono, la virinoj tute ne rajtis elekti edzon por si. En la edziniĝa tago, novedzino kun ruĝa kaptuko estis puŝita en la portseĝon kaj transportita al la domo de la novedzo; poste, ŝi devis riverenci surgenue kune kun la edzo al la ĉielo kaj la tero. Nur kiam la nokto profundigis kaj la gastoj foriris, ŝi povis unufoje vidi la viron, kun kiu ŝi devis pasigi la tutan vivon.

En la malnova socio, la novedzino ofte laboris kiel servistino en la familio. Ŝi devis pre-

pari manĝaĵojn, lavi kaj fliki vestaĵojn kaj fari ŝuojn ktp. por la tuta familio. Ŝi ofte estis riproĉita kaj insultita pro ĉiu ajn erareto, kaj se la bopatrino kaj la edzo havis malbonan temperamenton, ili povis laŭvole ŝin bati. Se ŝi ne naskis filon, la edzo povis preni por si alian virinon.

Tio estis la kaŭzo, kial multaj virinoj en la malnova socio metis sian esperon de liberiĝo en la edziĝon de siaj filoj. Ĉar tiam ili fariĝos bopatrinoj kaj povos mastrumi la familion kaj ĝui la servadon de siaj bofilinoj. Sed tian penson ne havas nun la bopatrino de malgranda He. Ĉar ŝi, kiel komunumano, estas laborema. La politika, ekonomia kaj socia pozicioj de la kvar membroj de la familio estas egalaj, ili ĝuas egalajn rajtojn kaj saman pagon por sama laboro. La bopatrino de Hiujing estas apenaŭ kvindek-jara kaj ofte partoprenas en kolektiva produkta laboro. En la lasta jaro, la nombro de

ŝiaj labortagoj estis kvarono de tiu de ordinara komunumano. Se oni demandas ŝin, ĉu ŝi estas multe okupata, ŝi ĉiam diras: "Jes, ĉar krom hejmaj laboroj, mi okupiĝas ankaŭ pri laboroj sur la kampoj. Tamen, nun mia okupo estas inda, ĉar mi ne plu estas servistino. Mi multe faras hejmajn laborojn nur por tio, ke la gejunuloj havu pli multan tempon por partopreni en kolektiva laboro."

En la nova Ĉinio, la libereco de geedziĝo de gejunuloj estas protektata de leĝo. La popola registaro malpermesas devigitan geedziĝon, bigamion, preni infanfianĉinon aŭ kromedzinojn kaj intervenon en liberan geedziĝon de la civitanoj. En la malnova Ĉinio, la vidvinoj estis malpermesitaj reedziniĝi. La Geedziĝa Leĝo publikigita en 1950 abolis la sistemon de feŭda geedziĝo sub devigo, vendado ktp., kaj protektas la egalecon inter la geedzoj kaj la interesojn de iliaj infanoj.



LA TRIA VOLUMO DE LA "VEGETAĴOJ DE LA INTERNA MONGOLIO" ELDONITA

La nomita libro estas kune kompilita de pli ol dek altlernejoj kaj sciencaj institutoj de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Ĝia tria volumo jam eldoniĝis, kaj la dua baldaŭ estos en presado. La du volumoj kun 650,000 ĉinaj ideo-

grafiaĵoj kaj pli ol 300 ilustraĵoj notas 468 speciojn de 13 familioj de la du-kotiledonaj vegetaĵoj en la Interna Mongolio.

La "Vegetaĵoj de la Interna Mongolio" kun ĉ. 2,400,000 ĉinaj ideo-grafiaĵoj kaj pli ol 1,000 ilustraĵoj estas la unua libro, kiu komplete kaj sisteme notas la speciojn, dislokiĝon kaj uzeblecon de ĉiuj vaskulaj vegetaĵoj de la regiono. Krome, la libro aldonas al si la mongolajn nomojn de la vegetaĵoj, priskribas karakterizaĵojn de ilia ekologia biologio kaj faras takson pri herboj por paŝtado. Tiu libro notas ankaŭ kelkajn speciojn de valoraj antikvaj restaĵ vegetaĵoj apartaj sur la stepoj kaj dezertejoj de la loko.

La tuta libro konsistas el 8 volumoj kaj la unua sinteza volumo estos eldonita post ĉiuj aliaj sep volumoj.

MALGRANDAJ HIDROELEK- TREJOJ SUR LA GUJĜOU-A ALTEBENAJO

En la kuranta jaro, 605 malgrandaj hidroelektrejoj estas en konstruado sur la akvoriĉa Gujĝou-a Altebenaĵo en sudokcidenta Ĉinio. Ilia nombro, kvalito, konstrua rapideco kaj sumo de la ŝtata investo superis tiujn de ĉiu ajn pasinta jaro.

La utiligebla akvoenergio de Gujĝou-provinco atingas pli ol 20,000,000 kilovatojn. Sed antaŭ la Liberiĝo troviĝis neniu hidroelektrejo en la kamparo de tiu provinco, kaj la nacimalplimulto loĝantaj en montoj uzis terebinton kaj bambupecojn por lumigado. Nun tiu provinco jam konstruis 5270 malgrandajn hidroelektrejojn, meznombro ĉiu gubernio havas 60 tiajn elektrejojn. Ilia kapacito konsistigas kvinonon de la totala kapacito de la tuta provinco.

Renkontiĝo de malnovaj amikoj

POSTTAGMEZE de la 19-a de majo, Je Gianjing, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, Nie Jonggen kaj Deng Jingcau, vicprezidantoj de KK de TPK, kaj Kang Keking, vicprezidentino de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, intervidiĝis kun Delegacio de la Antaŭa Observa Grupo de la Usona Armeo gvidata de Paul Domke.

Tio estis kortuŝa renkontiĝo de malnovaj amikoj. La revido post multjara disiĝo aparte ilin ĝojigis. Ili interparolis intime kaj rememoris pri la pasinta amika kontaktiĝo en Jan-an. Dum la intervidiĝo de 1.5 horoj, ridoj kaj aplaŭdoj aŭdiĝis de tempo al tempo en la halo.

Je la 5-a posttagmeze, kiam Prezidanto Je Gianjing kaj aliaj gvidantoj venis al la halo, la usonaj amikoj ĝoje iris renkonte al ili. La malnovaj amikoj varme manpremis kaj salutis unu al alia. Multaj el la usonaj amikoj diris al Prezidanto Je Gianjing, ke ili vidis lin en Jan-an. Je diris: "Ni estas malnovaj amikoj. Ni tre ĝojas pro via alveno kaj bonvenigas vin. Vi estas bonaj amikoj de la ĉina popolo. Jam forpasis pli ol 30 jaroj, al Jan-an kaj la tuta Ĉinio, kiujn vi vizitis antaŭe, okazis grandaj ŝanĝoj."

Estro de la delegacio Paul Domke diris: "Ni vidis la vere novan Ĉinion dum nia ĉifoja vizito. La ĉina popolo levis sian kapon kaj estas fiere iranta antaŭen sur la vojo de konstruado de la nova Ĉinio."

Alia usona amiko diris, ke ili vidis la ĉinan popolon tre ĝoja kaj okupata. Ĝi tre ĝojas ĝuste pro la okupateco.

John Service, kiu estis oficisto de la usona ambasado en Ĉinio dum la Dua Mondmilito, rememoris sian travivaĵon en Ĉinio. Li diris:


"Mi vidis la malnovan Ĉinion antaŭ la Liberiĝo kaj ankaŭ la novan Ĉinion formiĝantan en Jan-an; hodiaŭ mi vidis la novan Ĉinion. La kontrasto inter la malnova kaj nova Ĉinio estas tiu inter tago kaj nokto."

Kiam Sinjorino Jane Whittlesey vidis Kamaradinon Kang Keking, ŝi emociiĝis ĝis larmoj. En 1945, post kiam ŝia edzo, kapitano servanta en la observa grupo, estis mortigita de la japanaj invadantoj en la Tajhang-montara bazo, Ĉefkomandanto Gu De nomis la manĝojn uzatan de la observa grupo de la usona armeo en Jan-an "Memora Halo de Whittlesey" kaj faris al ĝi surskribaĵon. Gekamaradoj Je Gianjing kaj Kang Keking esprimis al ŝi sian simpatian.

Sur teotableto en la akcepta halo montriĝis hele flava rozo. Ĝi estis aparte alportita de Kamaradino Deng Jingcau por donaci al la delegacio. Ŝi rakontis al la gastoj pri la historio de la rozo:

"En 1944, usona aviadisto Oliver Hinsdell vundiĝis en plenumo de tasko, kaj estis savita de popolanoj en nia gerila regiono kaj eskortita al Jan-an. Tie li estis akceptita de Prezidanto Maŭ Zedong. Ĉefkomandanto Gu De kaj Kamaradoj Je Gianjing, Nie Jonggen kaj Ĝou Enlaj. O. Hinsdell restis en Jan-an ĝis la venko de la kontraŭjapana Rezistmilito. En 1973, kiam Sinjorino Amelia Hinsdell vizitis Ĉinion, ŝi kunportis al Kamarado Ĝou Enlaj usonan rozon. Mi plantis ĝin en nia korto kaj zorge ĝin kultivis. Tiu rozo pompe floris en la pasintaj jaroj. Hodiaŭ, mi aparte deŝiris ĝian floron por donaci al niaj amikoj. Ĝi estas floro de la amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj."

La parolo de Kamaradino Deng Jingcau estis interrompita de varmaj aplaŭdoj kaj poste ŝi



Je Gianjing, prezidanto de KK de TPK kaj la Delegacio de la antaŭa Observa Grupo de la Usona Armeo en Jan-an

daŭrigis: “Mi esperas, ke la floro de amikeco kultivita de niaj du popoloj en batalo kreskos pli pompe, ol tiu natura rozo. La amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj daŭros de generacio al generacio. Sinjorino A. Hinsdell siatempe sendis rozon ankaŭ al Prezidanto Maŭ. Se vi renkontos la rozodonacintinon post kiam vi revenos al via lando, nepre transdonu al ŝi miajn bondezirojn kaj transdiru al ŝi, ke la rozoj donacitaj de ŝi nun kreskas prospere.”

Vicprezidentino Deng diris ankaŭ: “Tiuspeca rozo karakteriziĝas per tio, ke ĝiaj floroj estas hele flavaj en la komenco kaj poste fariĝas hele ruĝaj. Tio simbolas, ke la amikeco inter ni estis ne profunda en la komenco tamen fariĝos profunda iom post iom en la estonteco.”

Wilbur Peterkin, la estro de la Antaŭa Observa Grupo de la Usona Armeo, rakontis al Kamaradoj Je Gianjing kaj Nie Jongĝen sian travivaĵon en Fuping. Li diris: En 1944, mi iris al la Ŝanĥi-Ĉahar-Hebej-a Limregiono kaj vidis, ke la Okavoja Armeo estas bone trejnita kaj havas altan batalvolon kaj grandan batalforton. La tagoj, kiujn mi travivis kune kun tiuj

eminentaj batalantoj, estis por mi signifoplenaj.

Malnovaj usonaj amikoj diris, ke la delegacio ĉifoje kunportis ankaŭ tri junulojn al Ĉinio, por ke ili propraokule vidu Ĉinion. La tri junaj amikoj esprimis, ke ili nepre klopodos por disvolvi la amikecon inter Usono kaj Ĉinio, prenante siajn antaŭulojn kiel ekzemplojn.

Je la fino de la intervidiĝo, ĉiuj bedaŭris pro la disiĝo, kaj iuj kortuŝiĝis ĝis larmoj. Ili elprenis siatempajn fotojn pri ili kaj ĉinaj gvidantoj por ke Kamaradoj Je Gianjing, Nie Jongĝen, Deng Jingĉaŭ kaj Kang Keking ilin rigardu. Ili diris, ke ili zorge konservis tiujn karajn objektojn.

Je la adiaŭo, Prezidanto Je Gianjing esprimis dankon al la usonaj amikoj pro ilia amikeco al la ĉina popolo kaj petis ke ili transdonu saluton al la usona popolo. Li diris, ke la ĉina kaj la usona popoloj estas amikoj. Por normaligi la diplomatajn rilatojn inter Ĉinio kaj Usono oni bezonas grandan klopodon kaj tempon. Ni devas kune klopodi por ĝia frua efektiviĝo. Paca kaj amika kunlaboro inter Ĉinio kaj Usono situantaj ĉe la bordoj de Pacifiko utilas al la monda paco.

Pro kio mi lernis Esperanton?

EN la pli ol kvardek jaroj de kiam mi komencis lerni Esperanton, mi ofte renkontis jenajn demandojn elmetitajn de miaj kamaradoj kaj amikoj:

“Ĉu Esperanto povas reale funkcii en interkontakto inter la popoloj de la mondo?”


“Ĉu Esperanto havos brilan estontecon?”

Jen estas miaj respondoj, kiujn mi faris laŭ mia persona praktikado kaj kono.

(1)

Pro kio mi lernis Esperanton? Nur pro tio, ke mi jam persone vidis kaj spertis, ke Esperanto ludas realan rolon en interrilito inter la popoloj de la mondo.

1931 estis la jaro, en kiu mi legis la broŝuron «Impreso pri Moskvo» verkita de k-do Hujucz. Pere de ĝi mi eksciis la internacian lingvon Esperanton, kiun k-do Hujucz uzis en Sovetunio por vojaĝi kaj amikiĝi. Tuj poste mi vizitis k-don Hujucz en la Ŝanhaja Komerca Presejo. En interparolo, mi sciis, ke li vojaĝis ne nur al Sovetunio sed ankaŭ al iuj eŭropaj landoj, kaj pere de Esperanto li konatiĝis kaj amikiĝis kun multaj eksterlandanoj. Tiu fakto montris al mi la veron, ke Esperanto povas servi kiel ponto de interkonatiĝo, interkontaktiĝo kaj interamikiĝo por la popoloj de la mondo. De tiam mi amis Esperanton. Mi ne interrompis la lernadon eĉ en malliberejo sub la malluma regado de Ĉiang-Kajŝek-kliko.



En la jaro 1936, mi foriris de mia patrio al Tajlando. Tie mi konatiĝis kun esperantistoj lokaj kaj ĉinaj elmigrintaj, kaj kune kun ili fondis la Tajlandan Esperanto-Asocion. En iuj lernejoj ekfunkciis esperantaj kursoj, kaj en la ĵurnalo «Gonghua Jibaŭ» aperis la felietono «Esperanto». Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito farita de la ĉina popolo, ni uzis Esperanton kiel batalilon kontraŭ la japana imperiismo, kaj kolektis monon kaj provizajojn por subteni la Okavojan Armeon kaj la Novan Kvaran Armeon. Samtempe ni interrilitiĝis kun eksterlandaj esperantistoj kaj esperantaj gazetoj (ekz-e «Voĉoj el Oriento», «Orienta Kuriero» ktp.), ankaŭ kiuj faris per Esperanto subtenon al la ĉina popolo en la rezistmilito kontraŭ la japana imperiismo.

Kvankam rompiĝis la rilato inter ni kaj esperantistoj eksterlandaj dum la Dua Mondmilito, tamen ni faris decideman bataladon kune kun la vastaj popolamasoj por nin liberigi el sub la fera kalkanumo de la agresantoj de la japana imperiismo.

Nelonge post la Dua Mondmilito, Ĉiang-Kajŝek-kliko subtenata de la usona imperiismo faris

la kontraŭrevolucion enlandan militon. La ĉina popolo estis refoje ĵetita en militan katastrofon kaj faŝistan sangan regadon. Por subteno al la liberiga milito de la ĉina popolo, por batalo kontraŭ restarigo de la imperiisma regado en Ĉinio kaj Tajlando, ni eldonis la esperantan gazeton «Orienta Raporto» kune kun tajlandaj esperantistoj por malkaŝi intrigojn kaj krimojn de la imperiistoj kaj iliaj lakeoj. Pro la sama celo ni interrilatiĝis kun la eksterlandaj kamaradoj kaj amikoj. Nia klopodo gajnis ilian fortan subtenon.

En majo de 1949, mi feliĉe revenis en la sinon de mia patrio. Poste ni ĉinaj esperantistoj elektis nian estimatan veteranan esperantiston k-don Hujucz kiel prezidanton de la Ĉina Esperanto-Ligo. Ni okazigis kunvenon por celebri la naskiĝon de la ligo. De tiam, la ĉina Esperantomovado iris en novan etapon. La gazeto EL POPOLA ĈINIO eldoniĝis regule, kaj dank' al ĝi la amikeca interrilato inter esperantistoj ĉinaj kaj eksterlandaj iom post iom restariĝis kaj vastiĝis. Esperantaj kursoj fondiĝis en pluraj urboj, kaj nombro da junaj esperantistoj estis elkulturitaj. Kaj mi mem rekomencis korespondi kun miaj karaj malproksimaj amikoj novaj kaj malnovaj. Sed tre bedaŭrinde, ke tia amikeca interrilato interrompiĝis sub tiranado de la "kvarpersona bando". Tamen mi ĉiam sopiras ilin, precipe sopiras la amikecon starigitan de ni en la komuna batalado kontraŭ faŝismo, imperiismo kaj hegemoniismo, kaj por nacia sendependiĝo, nacia liberiĝo kaj mondpaco. Nun, post la frakaso de la "kvarpersona bando", la ĉina popolo jam forigis de si la spiritan pilorion, kaj la obstaklo sur la vojo al amikeco inter la ĉina kaj alilanda popoloj estis forigita. La venko super la "kvarpersona bando" alportas novan esperon ankaŭ al ni ĉinaj esperantistoj. En la Pekina Lingva Instituto mi ĉiutage kontaktiĝas kun gestudentoj el diversaj landoj en la mondo, iuj el ili estas esperantistoj, kun kiuj mi parolas Esperante.

Laŭ mia persona praktikado kaj sperto, mi venis al la konkludo, ke Esperanto ludas rimarkindan rolon ne nur en amikeca interkontakto inter la popoloj de la mondo, sed ankaŭ en ko-

muna batalado por liberiĝo de la subpremataj popoloj kaj nacioj.

(2)

Nun mi transiras al la dua demando: "Ĉu Esperanto havos brilan estontecon?"

Nun, ni unue respondu la demandon: "Ĉu lingvo internacia estas bezonata?"

Evidente, tiu ĉi demando ne ekzistas ĉe la homoj, kiuj kontaktiĝas kun multaj eksterlandanoj. Ekzemple, se vi ne povoscias la lingvojn anglan, francan, germanan, hispanan ktp., kaj kontaktiĝus sen interpretisto kun angloj, francoj, germanoj, hispanoj ktp., do vi kaj ili starus unu antaŭ alia kiel mutuloj. Se vi kaj ili povoscias la saman internacian lingvon kiel Esperanton, vi kaj ili povus interparoli libere kaj gaje en renkontiĝo kiel samfamilianoj. (Tian senĝenecon kaj gajecon mi persone ĝuis en la pasintaj renkontiĝoj kun miaj karaj amikoj esperantistoj nederlanda, francaj, japanaj, ĉeĥoslovakaj, hungaraj, sovetaj, britaj, aŭstralia kaj islanda.) Alie, mi devus lerni iliajn naciajn lingvojn, aŭ ili devus lerni mian nacian lingvon. Kiel malfacila kaj tempraba estas por mi lernado de iliaj naciaj lingvoj!

Nun, ĝuste Esperanto povas ludi la rolon de internacia lingvo. Mi opinias, ke Esperanto havas jenajn superecojn:

(1) La vortoj de Esperanto ne estas arbitre elpensitaj, sed estas science artefaritaj post asimilado de fajnaj elementoj de diversnaciaj lingvoj.

(2) Esperanto estas regula tiel en prononcado kiel en gramatiko. Ĝi estas pli facile lernebla ol iu ajn nacia lingvo por la vastaj amasoj.

(3) Esperanto ĉiam riĉiĝas sin per novaj vortoj aperintaj en produktado, klasbatalado kaj scienca eksperimentado.

Surbaze de tio, mi firme kredas, ke Esperanto havos brilan estontecon.

La aŭtoro (Kiugi, Orverda) estas unu el la respondeculoj de la Pekina Lingva Instituto.

Kanto de la juneco

(Elektitaj ĉapitroj de la romano)

(Daŭrigo)

Resumo de la antaŭaj ĉapitroj: *Lin Daŭging*, hardita kaj provita en la malliberejo, fariĝis ankoraŭ pli firma. Por ŝi neniam forgesebla estis la eduko donita de Lin Hong, kiu ne nur rakontis al ŝi heroaĵojn de multaj komunistoj daŭrigantaj la batalon en malliberejoj, sed ankaŭ montris siajn proprajn noblajn kvalitojn de komunisto. Ŝi decidis lerni de Lin Hong por fariĝi komunistino batalanta ĝis la lasta spiro por paco kaj feliĉo de la homaro. Malgraŭ vunddoloro ŝi partoprenis en la malsatstrikio iniciatita de politikaj malliberuloj.

En la jaro 1935 Kuomintango subskribis la humilan interkonsenton kun la japana imperiismo, per kiu ĝi cedis al la lasta militan, politikan kaj ekonomian potencon de norda Ĉinio. Spiono Hu Meng-an, kiu arestis Lin Daŭging, fuĝis al la Sudo sekvante Kuomintangon. Lin Daŭging, ne kulpigebla per ia ajn atestaĵo kaj konfeso, liberiĝis dank' al garantio de profesoro Vang Hongbin, la patro de Vang Hiaŭjan. Post nelonge, respondeculo de la subtera partia organizo Giang Hua interligiĝis kun ŝi. Laŭ la konduto de Daŭging en la malliberejo, la partia organizo akceptis ŝin kiel membron de la Komunista Partio de Ĉinio kaj sendis ŝin al la partia oficejo por fari taskojn de interrilatanto. Por faciligi la laboron Lin Daŭging estis alinomita Gang Hiulan kaj ŝajnis sin filino de franjo Liu.

Ĉi sube estas la 25-a ĉapitro de la dua parto de la romano.

La Red.

XXV

Panjo — kiam mi tiel vokas ŝin, mi pleniĝas de varmo kaj forto, kiel dum mi vokis la neforgeseblan kamaradinon Lin Hong, kvankam ŝi estas nur 33-jara, nemulte pliaĝa ol mi.

Ŝi estas pala, malgrasa kaj malforta, kaj jam profunde ĝibiĝis, malgraŭ sia negranda aĝo — tio estas kaŭzita de longa restado en malliberejo kaj serioze suferita torturado. Ŝia persona travivaĵo estas tre malfeliĉa: Ŝia edzo jam martiriĝis, ŝia filo perdiĝis kaj ŝi restas sola sen parencoj. Tamen kiam ajn vi ŝin rigardas, ŝi ĉiam kviete kaj agrable respondas per mildaj kaj bonkoraj okuloj. Ŝi malofte parolis pri si mem kaj ĉiam senvorte laboradis. Ŝajne ni vivas kiel patrino kaj filino sin okupantaj pri lavado kaj flikado, efektive ŝi estas membro de la regiona partia komitato kaj mi komunistino. Kiam ŝi enmanigis al mi urĝan kaj gravan dokumenton, ŝi fiksas sur mi la bonkoran kaj firman rigardon kaj mallaŭte min atentigis kiel patrino:

“Hiulan, portu tiun ĉi veston al sinjoro Vang — atentu ke ĝi ne perdiĝu.” Ĉiufoje kiam mi ricevis tian gravan taskon sendi ion al s-ro Vang, sur mia korpo viglis neeldirebla forto, kaj ŝia rigardo bruligis mian koron kiel fajro. Per tia rigardo ŝi akompanis min ĝis mi eliris el la kaduka pordo de nia domo. Tiam mi diris en mi: “Kara panjo, mi certe plenumos la taskon.”

Tio estis fragmento de la notoj, kiujn Daŭging skribis kaj poste disŝiris, kiam ŝi laboris kune kun franjo Liu. Ĉar kunestante kun franjo Liu ŝi sentis samajn ĝojon kaj feliĉon kiel kun Lin Hong, ŝi ne povis sin deteni de skribado pri siaj sentoj.

Nia laboro estas peniga kaj malfacila. Estas multaj laboroj por la malmultaj plenumantoj, kaj mi devas labori kiel skribistino kaj komunikistino, kaj krome mi ankaŭ devas lavi kaj fliki vestojn por aliaj — ĉar mono por nia agado estas tre malfacile akirebla. Ifoje mi skribis dum tuta tagnokto, manĝis nur iom da maiza pano kaj ofte sentis kapturniĝon en noktomezo. Tiam panjo ĉiam min akompanis — mi skribis kaj ŝi voĉlegis. Vidante ŝiajn kvietajn kaj bonkorajn okulojn kaj ŝian vizaĝon dense sulkiĝintan pro malforteco, mi forgesis la malsaton kaj lacon kaj daŭrigis laboron plenenergie. Post noktomezo, ŝi stariĝis, ridetis al mi, plenigis glason per akvo kaj elprenis du kukojn. Ŝi mem prenis por si malgrandan pecon kaj la restaĵon ŝi donis al mi kune kun la akvo.

Jes, panjo ofte tiel lasis sin malsata por laŭeble min satigi. Mi prenis la akvon, kaj redonis al ŝi la kukojn, rigardante ŝian malgrasan vizaĝon:

“Panjo mi ne malsatas. Tage vi manĝis malmulte, do vi manĝu.”

“Ne, vi estas juna kaj la sano gravas por vi — mi havas respondecon por vi antaŭ la Partio.”

Panjo, mia kara panjo, kiel nobla vi estas! . . .

Panjo ne nur zorgis min en la vivo, sed ankaŭ donis al mi profundan kaj konkretan edukon en ideologio. Komence mi ne tre kontentiĝis pri mia laboro en la oficejo de la regiona partia komitato, malgraŭ ke mi diris al Giang Hua, ke mi bone ĝin plenumos. Mi estas revema kaj aspiras al vivo en la Ruĝa Armeo kaj intensa batalo — vivo uragana, sed ne volas rutinan laboron senekscitan. Tiu mia manko ne plene likvidiĝis eĉ post la hardado de pluraj jaroj. Tial, post alveno al la oficejo, mi iom mal-

kontentis kaj eĉ malĝojis pro farado de bagateloj kiel skribado, leterportado kaj vestolavado. Kvankam nenion mi diris, tamen panjo poste jam tion rimarkis. En iu nokto, neniam forgesebla nokto, panjo edukis min; ankaŭ mia neniam forgesebla amiko edukis min per sia lasta firma vivo. Nur nun mi ekkomprenis, kiel mi lin amas en tiom da jaroj. . . Se li ankoraŭ vivus en la mondo, se la damnindaj murdistoj de Kuomintango ne forrabus lian karan vivon, mi estus la plej feliĉa homo en la mondo. . . Sed hodiaŭ, mia espero tute vaporigis kaj mi, same kiel panjo, fariĝis malfeliĉa virino. . . Tion skribante mi ne povas min deteni de larmado. Se mi povus trovi lian tombon en Juhuataj de Nankino, mi volus elverŝi mian koron pri venĝo antaŭ ĝi. . .

.

Estis aŭtuna nokto. Malvarma vento brue frapadis la jam ŝiritan fenestropaperon. La luno alte leviĝis sur la ĉielo kaj ĝia klara hela lumo radiis sur la ĝojaj vizaĝoj de Liu Jifeng kaj Lin Daŭging tra fendoj de la fenestro. En tia bela kaj iom soleca nokto la du kamaradinoj, kiuj kune faras subteran laboron, ne povis endormiĝi dum longa tempo. Ili mallaŭte interparolis pri laboro kaj persona vivo. Alturninte sian kapon, kuŝante sur sia lito, franjo Liu demandis al Daŭging:

“Hiulan, — post kiam Daŭging eklaboris kun franjo Liu en la oficejo, ŝi alinomiĝis Ĝang Hiulan — vi rakontis al mi ĉion, escepte de tio ĉu vi havas amaton.”

Daŭging, kiu kutimas paroli senhezite, respondis nur post longa silento:

“Jes sed ankaŭ ne. . . . Panjo mi ne volas pensi pri tio.”

“Kion signifas la jes kaj ne? Kiu li estas?”

Daŭging kun vesto pendanta de sur la ŝultroj eksidis, poste surmetis la ŝuojn kaj ellitiĝis. Franjo Liu silente sekvis ŝin per la rigardo. Tra la heleta lunlumo ŝi vidis, ke nubo de ĉagreno kovras la junan kaj belan vizaĝon de Daŭging. Ŝi senbrue sidiĝis sur la litrando de franjo Liu,

prenis per ambaŭ manoj ŝiajn malgrasajn fingrojn kaj diris per iom tremanta voĉo:

“Panjo, certe vi ne pensis, . . . Lu, Lu-Giaĉuan, mi lin atendadas. Sed li. . . .”

Estis strange, ke franjo Liu verŝajne tion sciis delonge. Ŝi diris malrapide en kvieta tono:

“Oh, estas li? Tre bona kamarado! Kiam vi ekamis unu la alian?”

“Neniam, ni ne montris nian amon unu al la alia, sed mi scias, ke li amas min. Tial mi ĉiam atendas lin en la lastaj jaroj.” En tiu malgranda ĉambro plena de lunlumo larmoj trebrilis en la okuloj de Daŭging. Ŝi mallevis sian kapon kaj premis pli forte la manon de franjo Liu: “Panjo, diru al mi ĉu li ankoraŭ vivas? Ĉu vi havas ian informon pri li? . . .”

Franjo Liu skuis la kapon sur la kapkuseno. En ŝia menso intensiĝis batalo: ĉu komuniki al ŝi aŭ ne la informon pri la malfeliĉo? Se ŝi diros tion al ŝi, kiel turmentos ŝian fidelan koron la elreviĝo kaj ĉagreno pro malespero? Antaŭ ol ŝi decidis kion fari, ŝi aŭdis, ke Daŭging daŭrigis per mallaŭta voĉo:

“Panjo, mian sekreton en la koro mi malofte malkaŝis al aliaj. Vere, en mia vivo mi unufoje renkontis tiel estimindan kaj amindan homon, ke, ekvidante lin, mi sentis, kvazaŭ mi estus delonge konanta lin. . . .” Febre ruĝiĝis la vangoj de Daŭging kaj ŝia voĉo pleniĝis de neretenebla pasio. Franjo Liu karesadis ŝian manon kaj silente aŭskultis. “Tiam tiu Ju Jongze multe min ĉagrenis — kiel malfeliĉe, ke mi unue renkontis lin. Nur en la momento, kiam Ju diris al mi, ke Lu estis arestita, mi ekkomprenis, ke mi jam enamiĝis al li. . . .”

Apogante sin sur la litrando de franjo Liu, Daŭging ne plu parolis. Ŝi pene sin detenis por ne lasi eksplodi sian amon premitan preskaŭ jam tri jarojn.

Ankaŭ franjo Liu silentis. Malvarma ekblovo enpenetriĝis tra la fenestro. Ŝi kovris la korpon de Daŭging per la litkovrilo, ellasis ŝian manon, poste ŝi malrapide sidiĝis kaj diris:

“Infano, mi ne plu povas kaŝi al vi la veron — li jam martiriĝis.”

“Li jam martiriĝis? . . .” ŝi ripetis mekanike, kovris sian kapon per la litkovrilo kaj longe silentis. Franjo Liu vestis sin kaj ŝaltis la lampojn. Poste ŝi prenis el eluzita kesto plektita el salikvergetoj la fadene kunkudritan libron “Plej Bonaj Klasikaĵoj”. Ŝi malfermis la malnovan alikoloriĝintan libron kaj tranĉe disigis kelkajn duoble falditajn foliojn de ĝi, el kiuj aperis pluraj malnovaj krudaj paperpecetoj. Vidante ke Daŭging kvazaŭ endormiĝis kun kovrita kapo, ŝi alpaŝis, levis la litkovrilon kaj diris mallaŭte:

“Hiulan, ne malĝoju. Jen lia letero al vi. . . . Pardonu min, ke mi ne donis ĝin al vi ĝis nun.”

Daŭging salte leviĝis de sur la lito kaj kun larĝe malfermitaj okuloj rigardis franjon Liu:

“Li skribis leteron al mi?”

“Jes,” serioze diris franjo Liu. “En septembro de la pasinta jaro mi ricevis tiun leteron alportitan de lia komisiito, kaj li petis min transdoni ĝin al vi en oportuna tempo. Tiam vi ankoraŭ estis en la malliberejo. Probable en tiu sama monato li jam martiriĝis en Nankino. Poste vi liberiĝis, sed mi ne sciis, kiel vi opinias pri li, kaj ankaŭ timis, ke la informo vin malĝojigos, tial mi ne donis al vi la leteron.” Tion dirante, ŝi solene transdonis per ambaŭ manoj la kelkajn malgrandajn paperpecojn kun krajone skribitaj vortoj en la manojn de Daŭging.

Daŭging prenis ilin per tremantaj manoj. Antaŭ ol ŝi eklegis la leteron, larmoj jam falis en grandaj gutoj sur la paperon. Fine ŝi akiris kuraĝon por ĝin legi:

Se vi povos legi ĉi tiujn miajn paperpecojn, mi kredas, vi jam fariĝis mia bona kamaradino. En la lastaj jaroj, kvankam mi estas en malluma malliberejo, mi tamen ĉiam esperas, ke vi fariĝos batalantino de la plej avangarda klaso de la homaro, mia kamaradino kaj daŭriganto de nia revolucia afero. Ĉar ĉiutage niaj kamaradoj multe sangas kaj iras al eŝafodo por tiu triumfa tago. . . . Kamaradino, kara eta Lin, eble post nemultaj tagoj venos mia vico — mi ne mortis en Bejing, hazarda ŝanco ebligis

al mi vivi kaj batali pli da monatoj, kio estas tre ĝojiga afero por mi. Nun mi atendas mian lastan tagon kun nenia zorgaĵo en mia koro. Ĉar la tago de morto por la komunisma afero, por paco kaj feliĉo de la patrujo kaj la homaro estas la plej glora por mi. Kiam vi vidos mian leteron, eble mi jam antaŭlonge mortis en Juhuataj. Sed, kiam mi pensas, ke niaj sennombraj revoluciaj kamaradoj aperintaj kiel bambui-doĵ post printempa pluvo batalas unuj sek-vante aliajn, inter kiuj troviĝas vi, mi fieras, ĝojas kaj sentas feliĉon, konsciante ke la fina venko apartenos al ni.

Mi informiĝis iom pri vi kaj ankaŭ legis vian leteron. Estas bedaŭrinde, ke ni jam ne plu povos labori kune. En tiu lasta momento mi tre volas elverŝi al vi mian koron. Sed ne, pli bone estas ke mi ne parolu pri tio. Mi nur bedaŭras, ke la damndaj murdistoj forrabis nian feliĉon. kaj feliĉon de multaj karuloj. Eta Lin, pli energie antaŭenmarŝu, pli diligente vin hardu kaj pli brave venĝu nin! Batalu senĉese por la komunisma afero! Via fidela amiko varme benas vin. . .

Post kiam Daŭging finlegis tiun unuan kaj lastan leteron, ŝi tamen ĉesis larmi kaj ŝia mieno subite fariĝis eksterordinare kvietita. Ŝi staris sur la planko kiel bela pala statuo marmora. Kvan-kam li jam martiriĝis, forestis de la mondo, ŝi tamen ne vane atendis lin kaj ne vane larmadis pro li. Li estis bona kamarado meritanta la glorajn nomojn de komunisto, li silente amis ŝin kaj eĉ en la lastaj horoj de sia vivo li ankoraŭ pensis pri ŝi. En tiu malespera malĝojo ŝi sentis ian grandan konsolon kaj varmon. Kaj tiu varmo kaj konsolo same kiel tiu senmorta homo estos neniam forgesibla!

Antaŭ enlitiĝo de la sekvanta nokto Daŭging kun mallevita kapo dronis en meditado, sidante sur la litrando. Nereteneblaj larmoj denove falis sur ŝian veston. Ĉu ŝi iam havis amon? Ne, ne, ŝi neniel volis rememori la inkuban malple-
nan kaj trivialan amon kun Ju Jongze. Kiam ŝi fariĝis iom pliaĝa, kiam ŝi konis la vivon, kiam ŝi renkontis viron vere meritantan la pro-fundan amon kaj kiam ŝi estis preta prezenti al Lu Giaĉuan sian teneran kaj varman amon —

sinceran kaj ardan amon, kiun havas nur virino, matura kaj spertinta amaron de amo, tiu tamen estis subite arestita. Antaŭ ol ŝi povis esprimi al li iel sian senton, li jam estis forrabitita de la reakciuloj. En ĉiu libera tempo, en ĉiu malfacila kaj danĝera momento lia figuro aperis antaŭ ŝi kaj donis al ŝi senliman forton kaj kuraĝon. Sed pasis tago post tago, unu jaro, du jaroj, tri jaroj. . . Fine al ŝi venis la respondo: “Li jam martiriĝis”, “Antaŭlonge mi jam mortis en Ju-huataj. . .” Kiel peza bato tio estis. Ŝia koro ekbrulis pro doloro! Ŝi volis venĝi, venĝi Lu Giaĉuan, venĝi milojn kaj milojn da revoluciaj kamaradoj martiriĝintaj kaj venĝi la perditan feliĉon. . . Ŝi subite ekstaris, firme premis manon de franjo Liu staranta apud ŝi kaj diris, fikse rigardante ŝin per ruĝiĝintaj kaj ŝveliĝintaj okuloj:

“Panjo, permesu al mi iri al soveta regiono! Mi volas ekpreni pafilon, mi. . . mi ne povas vivi plu tiel kviete. . .”

Sidante sur la lito franjo Liu silentis dum longa momento. Sur ŝia flava vizaĝo aperis milda, kvietita kaj profunda malĝojo.

“Hiulan, jen estas alia letero, ankaŭ ĝin vi legu. — Similan malĝojon kiel la vian mi jam spertis.” Ŝi prenis el poŝto de sia subvesto alian malnovan paperfolion.

“Letero? Alia letero?” Daŭging prenis el la mano de franjo Liu folion da malnova leterpa-pero alikoloriĝintan kun multaj makuloj. Ŝi senkonscie ĵetis al ŝi rigardon kaj eklegis silente:

27 marto 1928

Mejhiang:

Jam estis anoncita la sekvo atendita de mi kaj tiu ĉi estas mia lasta letero al vi. Ne tro malĝoju, ĉar vi baldaŭ akuŝos. Estonte via ŝarĝo estos tre peza. Bone zorgu la infanon, zorgu vian sanon kaj estu preta venĝi min!

Mia sorto ne estas decidita hodiaŭ, sed antaŭlonge tion mi jam pensis. Jen mia fino — glora morto. Nun mi ne malĝojas, male, mi sentas senliman gloron kaj ple-zuron ĉar mi povas batali ĝis la lasta spiro por la proleta revolucia afero. Mejhiang,

vi estas fidela bona kamaradino provita de ŝtormo, do ni ĝoje adiaŭu unu la alian.

Min tre maltrankviligas nur tio: via fascinita amo kaj via subjektiva spitemo. La revolucio estas longdaŭra, malfacila kaj zigzaga. Koscience viciĝu inter la amasoj kaj diligente laboru! Neniam agu senpripense laŭ subita impulso pro mia martiriĝo!

Se la infano ĝenos vin, vi povos doni ĝin al aliaj. Neniel lasu ĝin malhelpi vian estontecon. Sed pro memoro mi petas vin nomi nian unikan infanon Nianlin (ĉine: memore al Lin. — La Trad.).

Mia lasta vorto estas: Batalu ĝis la fino! Vin hardu por fariĝi ankoraŭ pli firma bolŝevistino! Kuraĝe prenu sur vin la laboron neplenumitan de mi!

Venlin

La du samsortaj virinoj mallaŭte elverŝis unu al la alia sian koron en tiu soleca profunda nokto. Franjo Liu, viŝante siajn larmojn, diris:

“La testamento de Venlin kuraĝigis min. De kiam mi legis lian leteron post lia martiriĝo, Hiulan, multe mi ŝanĝiĝis. Kvankam mi kreskis kiel laboristino, tamen mi havis difektojn de malsolideco, krudeco, parado pri riskemo kaj egoisma kalkulemo. Sed post tio mi fariĝis egalanima kaj mi eklaboris relative solide. En ekstreme danĝera batalo mi ĉiam konservis ĉe mi tiun leteron, ĉar mi prenas ĝin kiel klarionon ordonantan antaŭenmarŝon kaj mian devizon.” Franjo Liu stariĝis kaj malsaltis la lampon. Sub la klara lunlumo filtriĝinta tra la fenestro ŝi prenis la manon de Daŭging, kaj ŝiaj okuloj subite ekradiis per neordinara brilo, kvazaŭ ili ekbrulus. Ŝi diris tamen mallaŭte kaj malrapide. “Hiulan, mi spertis multajn multajn malĝojojn — ja malfacile elteneblajn... Martiriĝis Venlin; multaj karaj kamaradoj, kiuj antaŭ kelkaj tagoj ankoraŭ kunsidis kaj interparolis kun ni, tamen subite venis informo, ke ili estas mortigitaj de murdistoj; mia infano — nia sola filo, kiun Venlin petis min nomi Nianlin, estis komisiita al iu laboristo-kamarado en Ŝanhajo. Post kiam la partia organizo suferis abruptan detruon, la laboristo transloĝiĝis kaj de tiam perdiĝis mia filo. Por trovi mian filon, mi ŝajnis min legomaĉe-

tanta kaj multfoje trapasis la straton kie loĝis mia filo, tamen Nianlin — mia sola infano ne estis retrovita...”

Daŭging opiniis, ke franjo Liu ekploregos. Ŝi iom levis la kapon kaj vidis, ke la franjo tamen restis tute aplomba kaj kvieta, kvazaŭ ŝi parolus pri alies afero. Nur ŝiaj lipoj iom tremis kaj la okuloj fariĝis pli brilaj eble pro larmoj. Ŝi ankoraŭ volis ion diri, sed ne trovis taŭgajn vortojn, ŝi do amare ekridetis kaj silentiĝis.

Daŭging alproksimiĝis apud franjon Liu. De kiam ŝi informiĝis pri la martiriĝo de Lu Giaĉuan en la lasta nokto, ŝia korpo ĉiam tremetis. Rigardante la malgrasiĝintan vizaĝon de la franjo, ŝi pene eldiris jenan vorton:

“Panjo, kiel vi pasigis tiujn jarojn? Paĉjo martiriĝis jam 7 jarojn.”

Kvazaŭ reakirinte kvietecon, franjo Liu diris malrapide:

“Post la morto de Venlin, ankaŭ mi estis arestita. Mia infano naskiĝis en la malliberejo. Dum la tri jaroj en karcero pluraj el miaj ripoj rompiĝis pro terura torturado, kaj mia sano estis ekstreme malforta kiam mi liberiĝis. Hiulan, eble vi pensas ke mi estas jam 40-50-jara, ĉu ne? Fakte mi havas nur 33 jarojn.” Ŝi subite ekridetis, ridetis mistere. “Kvankam mia aĝo ne estas granda, tamen mi jam ne plu povos ĝui feliĉon de familio. Tamen, Hiulan, mi deziras al vi feliĉon...” Tion dirante, franjo Liu fariĝis serioza kaj severa. Ŝi rigardis al Daŭging en la okulojn kaj diris: “Mi admonu vin per vortoj, kiujn diris siatempe Venlin al mi. Laboru diligente kaj solide! Restu tie, kie la Partio vin bezonas. Anstataŭ pafilo vi povas uzi plumon, ideologion kaj eĉ nian lavtabulon — ankaŭ ili estas armiloj — por batali kontraŭ la malamikoj.”

“Estu trankvila, panjo!” ankaŭ Daŭging fariĝis serioza. “Leginte la leteron de paĉjo Venlin, mi komprenas min... Panjo, mi ĵuras al vi, ke mi lernos de vi kaj ĉiam imitos vin veteranajn gekamaradojn!”

(Daŭrigota)



En Pekino

La Ĉiela Altaro

de LUO GEVEN

LA pasaĝeroj venantaj al Pekino per trajno povas vidi el vagonaj fenestroj, antaŭ atingo de la stacio, altan rondan konstruaĵon kun trietaĝaj tegmentandoj. Tio estas la Preĝejo de Riĉa Rikolto de la Ĉiela Altaro, unu el la gigantaj antikvaj konstruaĵoj de nia lando.


La Ĉiela Altaro troviĝas en la orienta parto de la ekstera urbo de Pekino, en kies okcidenta flanko staras la Altaro de Agrikultura Dio.

En Pekino troviĝas multaj altaroj kaj temploj, por kulti respektive la ĉielon, la teron, la sunon, la lunon kaj la diojn de agrikulturo, vento, pluvo, tondro, fajro k.a. En la antikveco, al la popolo mankis natur-sciencaj scioj, kaj la feŭda reganta klaso trompis ĝin per tia superstiĉo. La feŭda imperiestro pretendis sin esti Filo de la Ĉielo, reganta la polon laŭ ordono de la Ĉielo. La imperiestro persone partoprenis en

la solena ceremonio de kultado al la ĉielo, tial la Ĉiela Altaro estas la plej vasta kun la plej grandioza konstruaĵo el ĉiuj temploj kaj altaroj. Ĝi okupas areon de 272 hektaroj kaj estas ĉ. kvaroble tiom granda kiom la Imperiestra Palaco.

La Ĉiela Altaro, kiel grava parto de la imperiestra konstruaro de Ming-dinastio (1368-1644 p.K.), estis projektita kaj konstruita samtempe kun la pekinaj urbomurego, la Imperiestra Palaco kaj aliaj gravaj altaroj kaj temploj. Ĝia konstruado komenciĝis en 1406 p.K. kaj finiĝis post 14 jaroj. Tiam oni nomis la kultadon al la ĉielo kaj la tero eksterurba kultado, tial la Ĉiela Altaro estis konstruita ekster la urbo de Pekino. En 1554, oni konstruis eksteran urbomuregon en Pekino, kaj de tiam ĝi estas interne de la ekstera urbomurego. En la komenco, la Ĉiela Altaro funkciis kiel loko por kulti samtempe la ĉielon kaj la teron. Poste oni starigis en la norda antaŭurbo la Teran Altaron, kaj ĝi fariĝis loko speciale por kulti la ĉielon kaj preĝi por riĉa rikolto.

Trairinte straton 2 kilometrojn longan sude de Ĝengjangmen-pordego, la suda pordego de la interna urbo de Pekino, oni povas atingi la okcidentan pordegon t.e. la frontan pordegon de la Ĉiela Altaro. La



1. La Okcidenta Pordego
2. La Palaco de Fasto
3. La Preĝejo de Riĉa Rikolto
4. Dia Vojo
5. La Templo de la Firmamentito
6. La Ronda Altaro

fronta pordego de la gravaj antikvaj konstruaĵoj de Ĉinio ĉiuj vizaĝas al la sudo. Kial do la Ĉiela Altaro staras vizaĝe al okcidento? Ĉar en la kompleta projekto de la urbo ĝi kaj la kontraŭa Altaro de Agrikultura Dio devas stari simetrie. Dum kulta ceremonio, la imperiestro povas oportune eniri en la Altaron de Agrikultura Dio en okcidento post kultado en la Ĉiela Altaro en oriento. Tamen por observi la tradicion kutimon, la ĉefaj konstruaĵoj de la Ĉiela Altaro ĉiuj staras vizaĝe al sudo.

La Ĉiela Altaro havas du ruĝajn ĉirkaŭmurojn, kiuj dividas ĝin en du partojn, la internan kaj la eksteran. La ekstera parto longas je 1,700 metroj de oriento ĝis okcidento kaj je 1,600 metroj de sudo ĝis nordo; la interna parto longas je 1,100 metroj de oriento ĝis okcidento kaj je 1,200 metroj de sudo ĝis nordo. La du ruĝaj muroj estas kvadrataj en la suda duono, kaj duonrondaj en la norda duono. Rondo simbolas la ĉielon dum kvadrato la teron. Tio prezentas la malpravon konon de ĉinaj antikvaĵoj pri la ĉielo kaj la tero.

En la fronta pordego de la Ĉiela Altaro troviĝas larĝa aleo longa je 1 kilometro, kun altaj pinoj kaj cipresoj ombroriĉaj en ambaŭ flankoj, kiuj impresas la ĉeestantojn per mistereco kaj kvieteco konvenaj por kultado al la ĉielo.

Sude de la aleo, ĉe la enirejo en la interna parto troviĝas kvadrata konstruaĵo, nome la Palaco de Fasto, ĉirkaŭata de alta murego kaj du kanaloj ene kaj ekstere. En la tago antaŭ la kultado, la imperiestro deĵas loĝi tie por fasti.

En la suda parto de la ekstera korto antaŭe estis Domo de Diaj Muzikistoj, kie oni speciale kulturis muzikistojn por la kulta ceremonio.


Apud ĝi estis oferaĵejo, kiu speciale provizis oferotajn brutojn.

La supre menciitaj tri konstruaĵoj estas akcesoraj konstruaĵoj por la kultado. La ĉefaj konstruaĵoj de kultado konsistas el du grupoj, nome la Grena Altaro por kulti la grenan dion kaj la Ronda Altaro por preĝi al la ĉielo. Ĉi tiuj estas en la interna korto.

En la orienta fino de la aleo estas dia vojo, kiu interligas la supre

diritajn du konstruaĵojn. La dia vojo larĝas je 28 metroj, longas je 360 metroj kaj altas je 2.5 metroj. Irante sur ĝi inter la verdaj pinoj ĉe ambaŭ flankoj, oni sentas sin kvazaŭ en aero.

En norda fino de la dia vojo estas konstruaĵo de la Grena Altaro. La altaro estas ĉirkaŭata de kvadrata malalta muro kun pordoj ĉe oriento, okcidento kaj sudo. Enirinte la frontan pordon en sudo



Parto de la Ĉiela Altaro

oni povas vidi la Preĝejon de Riĉa Rikolto starantan sur trietaĝa blankmarmora ronda teraso, kiu situas ĉe la centro de granda brikpavimita placo. Ĉiu etaĝo estas borderita per blankmarmora balustrado. En la kvar flankoj de ĉiu etaĝo estas po unu ŝtona ŝtuparo. En la mezo de ĉiu ŝtuparo estas ŝtonplato kun gravuraĵo de drakoj aŭ feniksoj en nubaro.

La preĝejo estas ronda templo kun diametro de 30 metroj kaj alteco de 38 metroj, havas trietaĝajn tegmentrandojn kun malhele bluaj glazuritaj tegoloj, kaj ĝia pinto estas ornamita per orumita bronza globo.

Tiu konstruaĵo ornamita per koloraj pentraĵoj, kun blankmarmora teraso kiel bazo, bluega tegmento, ruĝaj kolonoj kaj brila orumita globo supre estas tre ĉarma.

La templo havas neniun muron sed nur latispordojn kaj ĝia tegmento estas subtenata de 28 grandaj lignaj kolonoj. Sur la kolonoj estas traboj kaj trabetoj en krucostrukturo originala de la ĉina arkitekturo.

La templo estis loko, kie oni preĝis por riĉrikolta jaro. Ne nur la Grena Altaro kaj la templo estas rondaj por simbolo. Eĉ la kolonoj de la templo estas rondaj, laŭ oni diro, simbolas temperojn. La 28

kolonoj estas dividitaj en tri trupojn, la eksteraj 12 kolonoj, kiuj subtenas la malsupran tegmentrandon, simbolas la 12 tagtemperojn (ĉiu tagtempero kovras 2 horojn); la mezaj 12 kolonoj, kiuj subtenas la mezan tegmentrandon, simbolas la 12 monatojn de la jaro; la internaj 4 kolonoj, kiuj subtenas la supran tegmenton, simbolas la kvar sezonojn; kaj la eksteraj kaj mezaj 24 kolonoj simbolas ankaŭ la 24 sunperiodojn de la luna kalendaro de Ĉinio. Kompreneble, ĉio tio spegulas nur superstiĉajn ideojn en feŭda socio. Sed ĝiaj arkitektura kaj plastika artoj ankoraŭ estas admirataj eĉ hodiaŭ.

La Preĝejo de Riĉa Rikolto



Se vi iras suden de la templo laŭlonge de la dia vojo, trapasinte iun pordegon, vi venas al la norda flanko de la Ronda Altaro. Antaŭ ĉio, oni vidas la Templon de la Firmamento kun alteco de 19.8 metroj, kiu havas rondan tegmenton de blue glazuritaj tegoloj. En malproksimeco la templo vidiĝas kvazaŭ malfermita giganta ombrelo el gemoj. La sankta nomtabuleto de la Ĉielo estis konservata tie, kaj kiam okazis la ceremonio de kultado al la Ĉielo, ĝi estis translokita al la Ronda Altaro.



La ŝtonplato kun gravuraĵo de nuboj kaj feniksoj

Ĉirkaŭ la Templo de la Firmamento staras ronda alta muro, t. e. la interesa sontranssenda muro. Se iu homo murmuras ĉe iu loko kun la kapo premata al la muro, alia povas aŭdi klare la voĉon ĉe alia loko kvazaŭ en telefonado. Antaŭ la templo estas la Tri Eĥaj Ŝtonoj. Oni povas aŭdi unu, du, tri, eĉ pli multajn eĥojn, kiam oni manklakas starante sur malsamaj ŝtonplatoj. Tiu fenomeno estiĝas pro la malsameco de la distancoj trapasitaj de la eĥoj resenditaj de la ronda muro kaj ĉirkaŭaj konstruaĵoj.

Sude de la ronda muro estas la Ronda Altaro, kiu estas la ĉefa konstruaĵo de tiu grupo. Ĝi estas trietaĝa kaj ĉiu etaĝo estas ĉirkaŭata de blanka marmora balustrado. La Ronda Altaro estis loko, kie la imperiestro kultis la ĉielon, tial ĝiaj formo kaj strukturo plenas de koloro de superstiĉo kaj fantazio. La tri etaĝoj estis konstruitaj en ronda formo, kiu simbolas la ĉielon. Ĉar la ĉielo estas ekstreme alta, tial sur la altaro estas neniu konstruaĵo. En la antikveco oni opiniis, ke la ĉielo estas virseksa, tial la diametro de la terasoj, la nombroj de etaĝoj de la ronda altaro, la ŝtupoj de la ŝtuparoj, la ŝtonplatoj de la balustradoj kaj la pavimaj ŝtonspecoj ĉiuj estas unu, tri, kvin, sep, naŭ aŭ

pluroblo de ili. Ekzemple la diametro de la plej supra etaĝo estas 9 ĝang-oj (1 ĝang-o = $3\frac{1}{2}$ metroj), tiu de la dua etaĝo 15 (3 x 5) ĝang-oj kaj tiu de la baza etaĝo 21 (3 x 7) ĝang-oj. En la centro de la supra etaĝo estas ronda ŝtonplato, la unua rondo ĉirkaŭ ĝi konsistas el 9 ŝtonplatoj, la dua rondo el 18 ŝtonplatoj, la tria el 27 ŝtonplatoj, kaj la plej ekstera naŭa rondo el 81 ŝtonplatoj. Krome, ĉirkaŭ ĉiu etaĝo estas kvar supreniraj vojoj, kiuj havas po 9 ŝtupojn. La balustrado de la supra, meza kaj baza etaĝoj respektive enhavas 36, 72 kaj 108 ŝtonplatojn. La Ronda Altaro estas ĉirkaŭata de du malaltaj muroj, la interna estas ronda kaj la ekstera kvadrata. En kontrasto kun la du malaltaj ruĝaj muroj kun glazuritaj tegoloj supre kaj krad-pordoj travideblaj, la blanka Ronda Altaro as-

pektas kvazaŭ blanka nubo ŝvebanta super la muroj.

La ronda ŝtonplato en la centro de la Ronda Altaro estas fame konata kiel "Eĥo-ŝtono". Se oni kunfrapas la manojn starante ĉe ĝia centro, oni povas aŭdi fortan eĥon. Se ne ĉe la centro, oni aŭdas nur haosan malfortan eĥon. La kaŭzo de tia fenomeno estas tio, ke ĉe la centra punkto koncentriĝas la eĥoj resenditaj de la ĉirkaŭaj balustradoj, sed ĉe aliaj punktoj ne. Kvankam la akustikaj fenomenoj de la Eĥo-ŝtono, la Sontranssenda Muro kaj la Tri Eĥoŝtonoj ne estis projektitaj, tamen ili montras la altan nivelon atingitan de la ĉina antikva arkitekturo.

La Ĉiela Altaro estas produktaĵo de la politika kaj teokratia potenco




La Templo de la Firmamento

en kombino de ĉina feŭda epoko. Hodiaŭ, la feŭda regado de la imperiestro jam estas renversita, kaj sekve de populariĝo de scienco, la popolo ĉiam pli bone konas la naturon kaj ĝin konkeras paŝon post

paŝo. La superstiĉo kulti la ĉielon kaj preĝi por riĉa rikolto jam fariĝis pasintaĵoj. La Ĉiela Altaro jam tute ĉesigis sian antaŭan funkcion. Hodiaŭ ĝi jam fariĝis popola parko, kaj la grandiozaj antikvaj kons-

truoj estas aprecataj kaj esplorataj de la popolo.

** La aŭtoro estas esploristo pri antikvaj konstruaĵoj de la Ŝtata Administrejo de Kulturaj Objektoj.*



La Ronda Altaro



Edgar Snow—fidela amiko de la ĉina popolo

de GIANg SAN




Edgar Snow

La Unua Fremdlanda Ĵurnalisto

En iu posttagmezo de junio, 1936, la arda suno brilis super la loesa altebenaĵo de norda Ŝenĥi en nordokcidenta Ĉinio kaj varma seka okcidenta vento kirle levis sablerojn. Sur la montvojeto kondukanta al Baŭ-an, la sidejo de CK de KPC en tiu tempo, iris malgranda taĉmento. Ĉe ĝia kapo iris kamparano kondukanta du azenojn, kiuj portis litaĵojn, fotoaparaton kaj me-

dikamentan keston. Lin sekvis du junaj fremduloj, malgrasaj, lacaj, sed vigle marŝantaj grandpaŝe. Ili estis usona ĵurnalisto Edgar Snow kaj usona kuracisto George Hatem.

Kaj de tie komencis sian kvarmonatan vizitadon al la soveta regiono de nordokcidenta Ĉinio Edgar Snow, kiu ekiris de Bejping, trarompis unu post alia blokadajn liniojn de Kuomintang-armeo kaj trapenetris lokojn, kie furiozis banditoj, malgraŭ vivdanĝero, kun firma deziro viziti la Komunistan Partion de Ĉinio kaj la



Prezidanto Maŭ Zedong kaj Edgar Snow

Ruĝan Armeon, al kiuj atribuis multajn krimojn la reakciularo de Ĉiang Kajŝek.

En 1905, Edgar Snow naskiĝis en Kansas-urbo en Misurio de centra Usono, kaj en 1928, diplomitiĝis en la Ĵurnalisma Instituto de Misuri-Universitato. Kaj en tiu sama jaro, li veturis transoceane al Ŝanhajo de Ĉinio. De tiam, li laboris kiel ĵurnalisto sendita de pluraj usonaj kaj anglaj ĵurnaloj kaj gazetoj al Ĉinio kaj vizitis multajn lokojn de Ĉinio. La tragikaj scenoj de katastrofoj kaŭzitaj de oftaj enlandaj militoj kaj invadoj de fremdaj landoj profunde gravuriĝis en la memoro de E. Snow. En frua printempo de 1933, li venis de Ŝanhajo al Bejping. Li kontaktis tie, dum instruado en Janging-

Universitato, revoluciajn studentojn kaj subterajn laborantojn de la Komunista Partio. Li aktive prizorgis kaj subtenis la ĉinan studentan movadon kaj la bataladon de la ĉina popolo kontraŭ la japanaj agresantoj, kaj klopodis akiri informojn pri la evento, ke la Ĉina Ruĝa Laborist-Kampanara Armeo faris Longan Marŝon de 25,000 lioj sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj sukcese atingis de la centra soveta regiono en Gianghi nordan Ŝenhi, la bazon de rezistado kontraŭ la japana agreso. Pro plenenergia blokado kaj dissemado de kalumniaj mensogoj fare de la Kuomintanga reakciularo, la popoloj de la mondo malfacile povis akiri informojn pri la vera stato de la Komunista Partio kaj la Ruĝa Armeo de Ĉinio. Por koni la veran staton,

korekti la publikajn opiniojn kaj faligi la izol-muron, E. Snow decidis trarompi la blokadon de Kuomintango, sekrete iri en la revolucion bazlokon en norda Ŝenhi kaj fari ĵurnalistan aktivadon.

Enirinte la revolucion bazlokon, E. Snow tuj vidis tute novan mondon: Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo batalis heroe; la malpuraĵoj de la malnova Ĉinio estis forlavataj de la revolucia torento; nova Ĉinio kun feliĉa popolo jam radiis per bela aŭroro. Li entuziasme kaj streĉe faris intervjuojn tage kaj nokte. En grizeblua uniformo de ruĝarmea soldato li kore interparolis kun komandantoj sur fronto kaj eĉ klarionistoj konataj kiel "ruĝaj diabletoj"; iris en kamparanajn kaverndomojn kaj fabrikojn, prenis milian manĝon same kiel lokaj popolanoj kaj nokte kuŝis kun ili sur hejtita terlito, kaj vaste konis bataladon, produktadon, lernadon kaj vivon de la armeanoj kaj popolanoj de la revolucia bazloko, eĉ inkluzive de iliaj sportaj aktivadoj kaj familiaj statoj.

Neniam forgesebla por E. Snow estis tio, ke en tiu periodo, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong plurfoje intervidiĝis kun li en kaverndomo, amike interparolis kun li sub petrola lampo tra tutaj noktoj, kaj per "lingvo klara kiel printempa fluo" prezentis al li la historion de la disvolviĝo de la ĉina revolucio, la Ruĝan Armeon kaj la revolucion bazlokon de norda Ŝenhi, la opinion de la Komunista Partio de Ĉinio pri rezistado kontraŭ la japana agreso kaj sian batalan revolucion vojon. Ankaŭ Vicprezidanto Ĝoŭ Enlaj, Ĉefkomandanto Ĝu De kaj aliaj gvidantoj de la Ruĝa Armeo faris multfojan longan interparolon kun li. Dank' al sia zorga enketado kaj esplorado li akiris grandan kvanton da valoregaj materialoj, inter kiuj la plej trezoraj estas la ĉefnotoj pri la longa parolo kaj la fotoj de Prezidanto Maŭ farita de li.

Tiu vojaĝo fare de li al norda Ŝenhi starigis profundan amikecon inter li kaj la armeanoj kaj

popolanoj de la revolucia bazloko. En unu el siaj poste aperigitaj libroj, li skribis jene siajn sentojn je la foriro de la bazloko: "La lastan fojon mi iris sur strato de Baŭ-an, kaj ju pli mi proksimiĝis al la urba pordego, des pli malrapidiĝis miaj paŝoj. . . Mi ege ĉagreniĝis. Mi sentis, ke mi kvazaŭ ne estus reiranta al la hejmo Stelo super Ĉinio".

"Ruĝa Stelo super Ĉinio,, Skuis la Mondon

Reveninte al Bejping, E. Snow tuj komencis skribi siajn travivaĵojn de la soveta regiono, malgraŭ sia laciĝo post daŭra vizitado de sinsekvaj monatoj. Li titolis sian verkon per "Ruĝa Stelo super Ĉinio".

En tiu verko, li prezentis al la tutmonda popolo, per simpla lingvo kaj granda nombro da fotoj, la revolucion batalon de la ĉina popolo sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, raportis la epopean Longan Marŝon de 25,000 lioj faritan de la ĉina Ruĝa Laborist-Kamparana Armeo, raportis detale pri la ekzistanta stato kaj disvolviĝo de la politikaj organizoj, ekonomiaj politikoj, industria kaj agrikultura produktado kaj la kultura, eduka kaj higiena aferoj en la revolucia bazloko de norda Ŝenhi, kaj la revolucion idealon kaj novan vivon de la ordinara kamparanoj, laboristoj, ruĝarmeanoj kaj kadroj de bazaj unuoj. Li dediĉis aparte grandan parton de la libro al viveca kaj detala rakonto pri la granda revolucia praktikado de Prezidanto Maŭ Zedong, Vicprezidanto Ĝoŭ Enlaj kaj Ĉefkomandanto Ĝu De kaj aliaj partiaj kaj ruĝarmeaj gvidantoj, kaj ripetfoje esprimis sian estimon al ili.

Post tiu vizitado, E. Snow jam konis la revolucionajn fortojn de la ĉina popolo kaj la ĝustecon de la linio de la Komunista Partio de Ĉinio kaj antaŭvidis la certan venkon de la ĉina revolucio. Li skribis: "La ĉina socia revolucia movado eble suferos malvenkojn aŭ eble retiriĝos

portempe, . . . tamen ĝi ne nur plue kreskos, sed ankaŭ venkos finfine”, kaj “kiam venos la venko, ĝi estos tiel fortega, kaj ke la ŝprucado de



ĝia detrua forto estos tiel nerezistebla, ke ĝi plene detruos la tutan perforton de imperiismo kiu nun tretadas la Orienton.” Kiel en tiu verko, tiel same en siaj paroloj kaj raportoj al ĉinaj kaj alilandaj geamikoj, li ĉiam entuziasme kaj nerefuteble propagandis la grandan veron, ke nur sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo povos forpeli la japanajn agresantojn kaj turni la suferplenan malnovan Ĉinion en brilan novan Ĉinion.

Kiel sunradioj penetrantaj tra nigraj nuboj, la artikoloj, fotoj kaj paroloj de E. Snow forte trapikis, antaŭ la ĉina popolo kaj la aliaj popoloj de la tuta mondo, la kalumniojn dissemitajn de la reakciularo de Ĉiang Kajŝek kontraŭ la Komunista Partio kaj la Ruĝa Armeo, forte kuraĝigis kaj subtenis la revolucion batalon de la ĉina popolo. En la sekvanta jaro, la publikiĝo de “Ruĝa Stelo super Ĉinio” tuj faris sensacion al la tuta mondo kaj ĝi estis nomita de eksterlandaj recenzistoj “verko vere kun grava historia kaj politika signifo”. En Usono, tiu libro fariĝis la plej rapide kaj la plej multe vendata verko pri la Malproksima Oriento, kaj pluvadis sur li leteroj



• Edgar Snow kaj
ruĝarmejaj soldatoj
(en la 3 fotoj)


petantaj permeson eldoni liajn verkojn pri la vizito al norda Ŝenhi. En Londono, dum nur kelkaj semajnoj jam vendiĝis pli ol cent mil ekzempleroj de tiu libro. En la regiono regata de blanka teroro de la Komintanga regado, oni konkure klopodis, malgraŭ vivdanĝero, por havigi al si ŝancon legi cirkulantajn librojn kaj artikolojn verkitajn de E. Snow pri la soveta regiono de norda Ŝenhi; iuj eĉ zorge faris manskribitajn kopiojn por ilin cirkuligi; ankoraŭ iuj suriris la revolucion vojon kondukantan al la bazloko de norda Ŝenhi, kun la libro "Ruĝa Stelo super Ĉinio" en sia sino.

En 1939, E. Snow refoje venis al la revolucia bazloko de norda Ŝenhi, vizitis la revolucion sanktejon Jan-an kaj aliajn lokojn, vidis kiel obstine kaj necedeme bataladis la Okavoja Armeo kaj la vasta popolo sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio kontraŭ la japanaj agresantoj kaj la Kuomintanga reakciularo, denove faris detalan kaj profundan esploron pri la politikaj organizoj kaj aliaj sferoj de la bazloko kaj faris raporton al la mondo pri siaj travivaĵoj.

E. Snow vivis 13 plenajn jarojn en la malnova Ĉinio. En tiuj jaroj li faris multajn aferojn utilajn al la ĉina revolucio kaj la ĉina popolo. En kunlaboro kun aliaj, li tradukis multajn el la noveloj de Sinjoro Lusin en la anglan lingvon por ilin konigi al eksterlandanoj. Plurfoje li savis, riskante grandan danĝeron, gvidantojn kaj subterajn laborantojn de la ĉina kompartio kaj revolucion studentojn kaj aktive propagandis la opiniojn de la Komunista Partio de Ĉinio pri rezistado kontraŭ la japana agreso. Kaj krome, kune kun novzelanda verkisto Rewi Alley, fidela amiko de la ĉina popolo, fondis kooperativan organizon.

En printempo de 1941, E. Snow forlasis Ĉinion kun bedaŭro por reveni al sia lando. Propraokule vidinte la okazantan historian ŝanĝigon de la malnova Ĉinio en uragano kaj akirinte personan sperton pri la du diametre malsamaj socioj de la revolucia bazloko kaj la regiono sub la regado de Kuomintango, E. Snow decidis por si la direkton de sia vivo: La pulsado de lia koro strikte ligiĝis kun la historiaj paŝoj de la ĉina popolo en antaŭenmarŝo.

(Daŭrigota)





La Dua Vuhan-a Sosea Ponto liganta Hankoŭ kaj Hanĵang malfermiĝas al trafiko.



ŜOSEA PONTO NOVE KONSTRUITA EN VUHAN

Vuhan estas la urbotrio el Hankoŭ, Vuĉang kaj Hanĵang distranĉitaj de Jangzi-rivero kaj ĝia branĉo. Lastatempe la dua ŝosea ponto liganta Hankoŭ kaj Hanĵang jam malfermiĝis al trafiko. Ĝi, longa je

566.2 metroj kaj larĝa je 25.5 metroj, estas projektita kaj konstruita de nia lando mem kaj povas trapasigi kamionon kun ŝarĝo de 150 tunoj. La nova ponto pli longas je 2.5-oblo ol la unua.

La urbo Vuhan estas trafika centro de Hubej-provinco kaj transporta pivoto de Jangzi-rivero kaj la Pekina-Kantona Fervojo. Antaŭ la Liberigo, troviĝis neniuj pontoj en la urbotrio super Jangzi-rivero kaj Hanŝuj-rivero. Post la Liberigo konstruiĝis la unua ŝosea ponto liganta Hankoŭ kaj Hanĵang, kaj la Vuhan-a Pontego super Jangzi-rivero por trajnoj kaj aŭtoj, tiel ke la trafika kaj transporta kondiĉoj de la urbo estas plibonigitaj.

Ĉinio partoprenos en la Internacia Pupteatra Festivalo de Zagrebo

LA Kultura Ministerio de Ĉinio sendos, laŭ invito, la Ĉinan Pupteatran Trupon al Jugoslavio por partopreni en la konkurso de la 11-a Internacia Pupteatra Festivalo okazigota de Jugoslavio en la komenco de oktobro.


La nomita trupo flugos al Jugoslavio en la lasta tagdeko de septembro. Unue ĝi faros prezentadon en la teatra festivalo okazigota en Beogrado kaj poste partoprenos en la supre dirita festivalo en Zagrebo, en kiu ĝi prezentos programon "Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco". La nomita pupteatraĵo estas mito-teatraĵo, adaptita laŭ la fama ĉina klasika romano "La Pilgrimado al la Okcidento". Ĝi priskribas la saĝecon kaj bravecon de ĝia ĉefa heroo Sun Vukong kaj prikantas ĝian sentiman ribelemon kontraŭ trompo kaj sklavigo de tiranaj potenculoj al li, per vivecaj kaj interesaj intrigoj kaj tradicia artrimedoj.

La pupa arto de Ĉinio havas longan historion kaj estas multe ŝatata de vastaj amasoj. En la

pasintaj 23 jaroj post sia fondo la trupo ludis nemalmultajn bonajn pupteatraĵojn kaj faris vizitajn prezentojn en iuj landoj de Azio, Afriko kaj Eŭropo. Ĉifoje la trupo estos preta ludi la programon per Esperanto. La respondeculo kaj aktoroj de la trupo opinias, ke la partopreno en tiu pupteatra festivalo havas gravan signifon por akceli amikecon kaj interligon kun diverslandaj popoloj kaj lerni de aliaj landoj en pupteatra arto.

La Internacia Pupteatra Festivalo naskiĝis dank' al la propono de la Esperanta Ligo de Zagrebo de Jugoslavio, la Zagreba Pupteatro kaj Sisak-a Pupteatro kaj helpo de la Unesko, kaj okaziĝis ĝia unua festivalo en Zagrebo en 1967. De tiam ĝi okazas ĉiujare en la nomita urbo.

Por raporti tiun pupteatran festivalon kaj akceli la amikecon kaj interkomprenon de diverslandaj esperantistoj, nia redakcio sendos personojn al Jugoslavio kune kun la trupo.



La Dingdongling-a Maŭzoleo



La orientaj maŭzoleoj

EN la verda montaro de Zunhua-gubernio de Hebej-provinco en norda Ĉinio, troviĝas aro da maŭzoleoj de imperiestroj de King-dinastio (1644 — 1911 p. K.). Ĉar tiuj maŭzoleoj situas oriente de Pekino, ili estas nomataj la Orientaj Maŭzoleoj, en kontrasto al la Okcidentaj Maŭzoleoj de King-dinastiaj imperiestroj en Jihian-gubernio. Ĝi estas grandioza maŭzolearo de imperiestroj kun sistema aranĝo de Ĉinio.

La areo de la maŭzoleoj etendiĝas de Malanju en la oriento ĝis

Huanghua-monto en la okcidento, de Vuling-monto en la nordo ĝis la montparo Tiantaj kaj Jandun en la sudo. En tiu loko kun impone bela pejzaĝo lokiĝas 15 tomboj de 5 imperiestroj, 4 imperiestredzinoj kaj 5 imperiestraj kromedzinoj kaj 1 princino de King-dinastio. Kaj ekstere de la ĉirkaŭmuro de la maŭzoleoj troviĝas ankaŭ tomboj de princoj kaj gubernistino. Ĉiuj tiuj tomboj situas en la suda piedo de Ĉangĵuj-monto kun ĉefpinto en la mezo kaj pli kaj pli malaltaj pintoj en la orienta kaj okcidenta flankoj


simila al ventumilo, kaj la koloraj domegoj, turoj kaj kioskoj elrigardas inter verdaj pinoj kaj cipresoj sur la monto impresante kiel grandioza impona pentraĵo.

La centro de la maŭzolearo estas Hiaŭling sub la ĉefpinto de Ĉangĵuj-monto. Ĝi estas la tombo de la unua imperiestro de King-dinastio, nomata Ŝunĝi (1644 — 1661 p. K.). Tiu estas la plej perfekte ekipita maŭzoleo kun plej kompleta sistemo. Sur la pli ol 5 kilometrojn longa linio de ĝia ŝtona pordego en la sudo ĝis la piedo de la ĉefmont-

pinto, laŭorde staras dekoj da imponaj konstruaĵoj. Tiuj konstruaĵoj interligitaj per 12 metrojn larĝa vojo pavimita per brikoj kaj ŝtonoj manifestas la politikan ideon kaj feŭdan riton de la feŭda reganta klaso per evidentaj gradoj kaj taktoj kaj spegulas la superstiĉan ideon, ke la potenco de la imperiestro estas donita de dio kaj la rajto de la imperiestro estas la plej alta. En la memorŝtona kiosko sin trovas kolosa ŝtono, sur kiu gravuriĝis noto pri la travivaĵoj de la imperiestro. En Long-en-halo por kultado staras nomtabulo de la imperiestro, kaj la perono antaŭ la halo estas ĉirkaŭata de blankmarmora balustrado. En la plej alta konstruaĵo de la maŭzoleo nomata Mingloŭ staras ŝtono sur kiu gravuriĝis la titolo "Maŭzoleo de imperiestro aŭ imperiestra edzino X" en la hana, manĉua kaj mongola lingvoj. Post tiu konstruaĵo estas la tombmonteto kun ĉirkaŭmuro. Sub la altaĵo estas la subtera palaco, en kiu kuŝas ĉerko. La ĉefaj konstruaĵoj kaj la formo de la maŭzoleoj estas ĝenerale similaj unu al la alia.

La granda nombro da ŝtonaj skulptaĵoj kaj ŝtonaj konstruaĵoj de la Orientaj Maŭzoleoj plene mon-


La Juling-a Maŭzoleo



tras, ke la ŝtonskulpta arto de King-dinastio jam atingis tre altan nivelon. Ambaŭflanke de la dia vojo de la Orientaj Maŭzoleoj staras ŝtonaj figuroj de homoj kaj bestoj, simile al tiu de la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio. Plej grand-

nombraj estas tiuj de Hiaŭling, sume 18 paroj da ili, nome tri paroj da ministroj, tri paroj da generaloj kaj po du paroj da ĉevaloj, mitaj ĝirafoj, elefantoj, kameloj, kaj leonoj. Ĉiu figuro farita el sola ŝtonpeco estas bela kaj viveca. La

Gravuraĵoj el blanka marmoro antaŭ Long-en-halo de Dingdongling






alte staranta ŝtona pordego kun 6 kolonoj estas impona konstruaĵo farita laŭ strukturo de ligna konstruaĵo. La ornamaj desegnoj kaj bestaj figuroj gravuritaj aŭ skulptitaj sur la ŝtonpecoj estas tre belaj kaj vivecaj, kiuj estas tre raraj kaj montris altan nivelon de la artistoj. Sur la diaj vojoj al la Maŭzoleoj konstruiĝis grandaj kaj malgrandaj blankŝtonaj arkpontoj, sur kies balustradaj ŝtontabuloj kaj fostoj estas gravuritaj figuroj de drakoj, feniksoj kaj desegnoj de nuboj. La plej longa el la dekoj da balustradaj arkaj ŝtonpontoj havas 7 spanojn kun totala longeco de 110 metroj, kaj kune kun 5 5-spanaj, 18 3-spanaj kaj 6 1-spanaj ŝtonpontoj interligas la konstruaĵojn de la maŭzoleoj en integran tuton.

La subtera palaco estas grava konsistiga parto de ĉiu maŭzoleo. La subtera palaco de Juling de Imperiestro Kianlong (1736 — 1795

p. K.) jam ordigita kaj riparita estas alia subtera palaco prifosita de nia lando, post tiu de Dingling de Ming-dinastio. Ĝi ne nur havas originan stilon sed ankaŭ plenas je gravuraĵoj, kiuj mankas al la subtera palaco de Dingling. Tiu ĉi subtera palaco konsistas el tri haloj kun ŝtonarkoj kaj ne havas trabojn kaj kolonojn. Ĝi longas 54 metrojn kaj ĝia totala areo estas 327 kvadrataj metroj. Ĝi havas kvar ŝtonajn pordojn kun tegmentetoj el blanka marmoro skulptita en formo de tegoloj. Sur ĉiu ŝtona klapego de la pordoj troviĝas viveca skulptita figuro de staranta bodisatvo en malsamaj pozoj. Sur la muroj ambaŭflanke de la unua ŝtona pordo estas skulptitaj vivecaj kaj imponaj figuroj de la kvar ĉielaj generaloj kun siaj magiaj armiloj bivo, glavo kaj pagodo. Aparte mirinda estas tio, ke ĉiuj gigantaj ŝtonpecoj de la subtera palaco estas gravuritaj, la arka

plafono plenas je ornamaj desegnoj, sur la muroj gravuriĝis sutroj en la tibeta lingvo kaj magiaj vortoj en sanskrito. La artaĵoj estas altnivelaj kun harmonia aranĝo, strikta strukturo kaj granda integreco, kaj ili faris la tutan subteran palacon bele kaj impona.

La luksa maŭzolearo estas historia atestaĵo pri la kruelaj ekspluatado kaj sklavigado de la feŭdaj regantoj de King-dinastio al la popolo. Dingdongling, maŭzoleo de la diboĉema imperiestra patrino Cihj, estis ekkonstruita en 1873 kaj finkonstruita en 1881, per pli ol 2,300,000 uncoj da arĝento. Ĝi superis ĉiujn maŭzoleojn de ŝiaj prapatroj. Sed la avidema Cihj eĉ ne kontentiĝis pri tio. Kaj por montri sian "nesupereblecon", ŝi malkonstruigis ĝiajn tri halojn en 1895 kun la preteksto, ke ili kadukiĝis, kaj ilin rekonstruigis. Kaj tiu laboro daŭris ĝis ŝia morto. La rekonstrua-




*Kolorriĉaj desegnoj sur
traboj de Long-en-halo*

do de tiu maŭzoleo konsumis tiel grandegan monsumon, ke eĉ Juling ne povis kompari kun ĝi en tio. En 1895, nia lando estis venkita

en la Ĉina-Japana Milito kaj trafis naturan katastrofon maloftan en la historio, la ŝtato vizaĝis al financaj malfaciloj kaj popolanoj devis for-

lasi sian hejmlokon, migradi kaj malsatmorti, sed por prizorgo de la kadavro de Cihj, sennombraj laborantoj estis mobilizitaj kaj mul-

Stonskulptitaj homoj kaj bestoj starantaj ambaŭflanke de la dia vojo



tego da mono estis konsumita por rekonstrui ŝian maŭzoleon. Tio plene malkaŝis la esencan karakteron de malfeliĉigado de Cihi al la ŝtato kaj la popolo. Ĉiu briko kaj trabo de la Orientaj Maŭzoleoj estas saturitaj de sango kaj ŝvito de la vasta laboranta popolo. La sumo de la elspezita mono kaj la nombro de la mobilizitaj laborantoj por ilia konstruado estas nekalkuleblaj. Granda kvanto da valoregaj nanmutrunkoj estis kolektitaj el primitivaj arbaroj en sudĉiniaj montaroj, kaj estis tre malfacile transporti, el la krutaj montoj, tiujn lignojn pezajn po pli ol 5,000 kilogramojn maksimume, kaj por transporti ĉiun pecon al la konstruejo, centoj kaj eĉ pli ol mil laboruloj kaj du jaroj estis bezonataj. Kolosaj blankaj kaj bluaj ŝtonpecoj dehakitaj en Fangŝan-

gubernio pezis po milojn da kilogramoj, kaj la transporta distanco longis je centoj da kilometroj. La sablomontetoj ĉirkaŭ la maŭzoleoj estis artefaritaj, do estas imageble, kiom da homfortoj estis konsumitaj por tio. Por okupi la areon de la maŭzoleoj, la loĝantoj tie estis forpelitaj kaj iliaj domoj malkonstruitaj. Por konstrui tiujn maŭzoleojn, miloj kaj miloj da popolanoj servantaj en la konstruado mortis de lacego.

La Orientaj Maŭzoleoj de Kingdinastio estas kristalo de saĝo kaj ŝvitlaboro de la laboranta popolo de nia lando kaj valorega historia restaĵo. Tamen, dum la reakcia regado, ili estis terure detruitaj. Granda kvanto da valoregaj objektoj enterigitaj kun la mortintoj estis forŝte-

litaj. La pinoj kaj cipresoj dense kreskantaj en la areo estis forhakitaj, la ĉirkaŭmuro kun longeco de pli ol 15 kilometroj estis plejparte malkonstruitaj kaj nun restas nur parto de ĉ. 0.25 kilometro. La maŭzolea areo aspektis kvazaŭ ruino. Post la Liberiĝo, fondiĝis en 1952, sub la zorgo de la Partio kaj la registaro, Protektejo de la Historiaj Objektoj de la Orientaj Maŭzoleoj, kaj en 1961 la Orientaj Maŭzoleoj estis difinitaj kiel "ĉefa protektenda historia objekto de la tuta lando" kaj tieaj historiaj restaĵoj estis iom post iom rekonstruitaj kaj riparitaj. Nun, Juling kun ĝia subtera palaco kaj Dingdongling de Cihi jam estas renovigitaj kaj komencis akcepti vizitantojn.

*Budho sur ŝtona pordo
de la subtera palaco*



*Surmura ŝtongravuraĵo
en la subtera palaco*



INTERVIDIĜO KUN EKSTERLANDAJ ESPERANTISTOJ

En junio la redakcio de El Popola Ĉinio havis la plezuron intervidiĝi kun s-ro Daniel Kane de Aŭstralio, kiu iam studis en Pekina Universitato kaj nun laboras en Aŭstralio Ambasadorejo en Ĉinio. Ni ankaŭ ĝoje intervidiĝis kun s-ro Nakajama Kinzi, nia malnova leganto kiu venis al Pekino kiel membro de amikeca grupo de japanaj bibliotekistoj.

Dum la lastaj monatoj pliofti-

S-ro Ludwig Pickel, peranto de El Popola Ĉinio en FR Germanio, forpasis la 7-an de majo, 1978.

Kiel nia malnova amiko li faris multon por la disvastigo de nia revuo inter la esperantistoj de FR Germanio, donante entuziasman subtenon al nia entrepreno kaj kontribuante al la interkompreniĝo kaj amikeco inter

la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj FR Germanio.

Lia forpaso estas perdo kaj por nia komuna afero kaj por la germana Esperanto movado. Ĉe ni ĉiam restos respekta memoro pri li.

Ni sendas korajn kondolencojn al la familianoj de s-ro Ludwig Pickel.

ĝis nia renkontiĝo kun eksterlandaj esperantistoj. Por ni tio estas bonvena okazo por efek-

tivigi personan kontakton kun niaj legantoj kaj amikoj el ekster Ĉinio.

KALETOSKOPO

Haroza Infano

En la 30-a de septembro, 1977, juna kamparanino en Liaŭning-provinco de nia lando naskis infanon plenan de nigraj haroj.

Oni konstatis, ke la infano estas plene kovrita de nigraj haroj escepte de la manplatoj kaj plandoj. La haroj ĉirkaŭ la okuloj, buŝo kaj nazo estas ne tiom longaj kaj densaj kiel tiuj sur la vangoj. Tiuj sur

la ŝultroj atingis longecon de 4.6 centimetroj. La korpopezo de la kvarmonata bebo estis 9 kilogramoj, kaj ĝia sanstato estas bona.

Tio ĉi estas kazo de atavisma fenomeno. Nun koncernaj institucioj estas farantaj observadon kaj esploradon pri la haroza infano.



La haroza infano
kaj lia patrino



La haroza infano
en sia 8-a monato

Mono kaj Justeco

(Ujgura popola rakonto pri Afanti)

Iutage, la reĝo demandis Afanti: "Se kuŝus antaŭ vi mono en unu flanko kaj justeco en la alia, kiun el ili vi elektus?"

"Mi preferus monon," respondis Afanti.

"Kion vi diris, Afanti?" diris la reĝo. "En tia kazo mi certe preferus justecon, sed ne monon. Mono ja estas banala, dum justeco estas mal-facile trovebla!"

"Ĉiu prenas kion li malhavas, Via Majesto," diris Afanti. "Vi volas ĝuste kion vi malhavas!"

Enigmo pri objekto

Ĉe muro estas vojoparto,
Por iro taŭgas ne por salto;
per ĉiu paŝo kun manpalpo
leviĝos vi al plia alto.

*(Solvon trovu en la venonta
numero.)*

Hangĝoŭ-produktejo de Longging-teo

La pitoreska urbo Hangĝoŭ estas ĉefurbo de Ĝegiang-provinco en orienta parto de Ĉinio. Ĝi situas sur la bordo de Kiantang-rivero, ĉe la suda fino de la Granda Kanalo de Pekino ĝis Hangĝoŭ. Ĝi havas areon de 429 kvadrataj kilometroj kaj pli ol 1,000,000 loĝantojn. Tiu konsumata urbo antaŭ la Liberiĝo nun fariĝis prospera produkta urbo post pli ol 20-jara konstruado.

Hangĝoŭ estas urbo kun historio de pli ol 2,100 jaroj kaj famiĝas pro ĝia pitoreska Okcidenta Lago. La poeto Su Dongpo de la Norda Song-dinastio skribis jene en sia poemo:

*La brila akv' senlima belas en serena tago,
en pluv' mirindas montpejzaĝo en nebula
gazo:
kun Hizi komparebla 'stas la Okcidenta Lago,
ĝi ĉiam ĉarmas en ĉia ajn tualeta kazo.*

Li komparis la lagon kun Hizi la antikva belulino de nia lando, tial la lago nomiĝas ankaŭ "Hizi-lago". Tamen, la reakciaj regantoj de ĉiuj dinastioj, precipe burokrataj bienuloj en la lasta jarcento, ĝin ne nur ne ordigis, sed eĉ malbeligis, tiel ke la montoj fariĝis dezertaj kaj la lago stagnis. La nova Ĉinio donis novan vivon al la lago. La Partio kaj la popola registaro laŭplane faris al ĝi riparadon kaj konstruadon, plantis pli ol 30,000,000 arbojn en areo de pli ol 4,000 hektaroj, riparis kaj ordigis pli ol 30 pitoreskejojn kaj konstruis en kaj ekster la lago multajn parkojn, kies totala areo egalas 10-oblon de tiu antaŭ la Liberiĝo. La hodiaŭa Okcidenta Lago jam fariĝis pitoreska vizitindejo de la laborantaj popolanoj kaj fremdlandanoj.


Antaŭ la Liberiĝo, la industria bazo de Hangĝoŭ estis tre malforta kaj posedis nur 33 fabrikojn kaj metiejojn kun po pli ol 100 laboristoj. Nun ĝi jam havas industriojn de fero, ŝtalo, maŝinoj, kemiaĵoj, petrolrafino, elektroniko ktp., kiuj antaŭe ne troviĝis en ĝi. Multe disvolviĝis ankaŭ ĝia industrio de silkajoj kun longa historio kaj fame konata en kaj ekster la lando. La totala industria produktovalor de la tuta urbo estas 23-oblo de tiu tuj antaŭ la Liberiĝo.

Hangĝoŭ ankaŭ estasproduktejo de Longging-teo, unu el la famaj specoj de teo de Ĉinio. Longging estas loko ĉirkaŭata de montoj okcidente de la lago kaj unu el la vizitindejoj. Ĝi produktas bonkvalitan verdan teon aroman kaj bongustan. Kvankam tiu speco de teo havas historion de pli ol 1,200 jaroj, tamen grandpaŝa disvolviĝo de ĝi komenciĝis nur post la Liberiĝo, precipe post la fonda de la popolaj komunumoj. Dank' al zorgema kultivado kaj scienca administrado de komunumanoj la produktokvanto kaj kvalito de tiu teo senĉese altiĝas.





Hanggou en malproksimo




Prilaborejo de
Longging-teo



Nova tegardeno
de Hanggou

Studo pri nova speco de Longging-teo





Mejiavu, nova vilaço en montoj



Longjing-teo

Gustumo de Longjing-teo





La 5-an de majo, 1978, la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis unu pecon de speciala poŝtmarko "Galopanta Ĉevalaro" kaj dek pecojn de specialaj poŝtmarkoj "Galopanta Ĉevalo". La pentraĵoj en tiuj poŝtmarkoj estas faksimiloj de verkoj de la ĉina fama pentristo Hju Bejhong.



61

KOLORAJ ARGILAJ MODLAĴOJ



Fiŝado sur la Suda
Ĉina Maro (ĝing-
nacieco)
de Gang Cang



Por Konstrui
Kampojn (ŝe-na-
cieco)
de Geng Juhe

Atenta Aŭskultado
(aĉang-nacieco)
de Ĝeng Juhe



Ĉasado (olunĉun-nacieco) de Ĝeng Juhe



Sur vojo al Grena Kolektejo (ĝingpoa kaj taja nacieco)
de Gang Ĉangjuan kaj Ma Giaŝi



Nigra Papago

(Hana popola rakonto)


(Daŭrigo)

Vortoj kaj bildoj de Jin
Fengge, Ning Cengcun kaj
Ge Tian




6. La papago tre ĉagreniĝis kaj maltrankvilis pro la mastro. Ĝi ofte flugis al la malliberejo por vidi Liu San.


7. Post iom da tempo, la guberniestro rimarkis, ke la papago ofte alflugas por vidi Liu San, kaj ordonis kapti kaj enkaĝigi ĝin.



8. La papago indigne kriis al la guberniestro: "Vi manĝis karnon kaj trinkis sangon de homoj. Venos la tago, kiam viajn ostojn manĝos sovaĝaj hundoj."



9. La guberniestro forŝiris la plumojn de la papago kriante: "Haku ĝin en pecetojn kaj fritu en oleo!"




10. La papago estis metita sub tranĉilon, ĝia vivo estis en danĝero. Sed profitante la ŝancon, kiam la kuiristo sin turnis por preni oleon, ĝi forkuris.




11. Pasis unu jaro. La papago ricevis plumojn tutkorpe, kaj Liu San fuĝis el la karcero al montaro, kie li kulturis kampojn.



12. La papago serĉadis Liu San kaj subite aŭdis bruojn de gongo kaj tamburo, ĉar la guberniestro iris al templo por preĝo.




13. La papago flugis en la templon kaj sin kaŝis post la idolo. Ĝi diris al la preĝanta guberniestro: "Vi tiranis la popolon kaj faris maljustaĵojn. Zorgu vian hundan vivon!"




La guberniestro pensis ke parolas mem la budho, tuj konfesis siajn kulpojn kaj petis indulgon al lia vivo.



15. La papago diris: "Por savi vian animon, unue rive-rencu frapante la kapon kontraŭ la tero je 365 fojoj." Kaj tiel faris la guberniestro.



16. "Vi ofte blovis viajn lipharojn," aldonis la papago, "por montri vian koleron kontraŭ la subpremataj popolanoj, do ankaŭ surhavo de la lipharoj estas kulpo." Kaj la guberniestro devis forŝiri la lipharojn.



17. Subite aŭdiĝis bruo de ekflugo de birdo en la templo, kaj nur tiam la guberniestro ekkomprenis sian trompigon kaj kriis: "Papago!" Sed la papago jam forflugis por serĉi Liu San. (Fino)

